


EL POPOLA ĈINIO



Guanŝan-kluzdigo sur la Norda Rivero norde de Ŝjiĉjaŭ-monto, Kuangtung-provinco, estas unu el la ĉefaj konstruaĵoj de la akvokonserva projekto Ĉjaŭbejdaŭej por malebligi inundon.

Nov.
1953

9/11/53

La Universala Elektado de Ĉinio

Ĉen Bau

La unua tutlanda universala elektado de Ĉinio, kiu baziĝas sur universala voĉdonrajto, nun bone iras. Tio plenumas la rezolucion de la Konsilo de la Centra Popola Registaro de la 13a de januaro, kiu preparas okazigon de ĉiurangaj popolaj kongresoj kaj la Tutlanda Popola Kongreso.

La plej granda elektantaro en la mondo nun sin okupas pri elektado de delegitoj al la bazaj organoj de regpotenco—la *ŝjang-oj**, urbetoj, urbaj distriktoj kaj urboj sen distriktoj—entute pli ol ducent kvindek mil lokaj registaroj. Kiam ĉi tiu elektado ĉe la plej malsupera rango estos kompletigitaj, la popolaj kongresoj de gubernio, urbo, kaj provinco estos elektataj paŝon post paŝo. La procedo atingos sian apogeon per elektado de la Tutlanda Popola Kongreso, kiel la plej supera organo de regpotenco por adopti la konstitucion, aprobi la unuan kvinjaran planon de nacia konstruado kaj elekti novan Centran Popolan Registaron. Tiu ĉi elektado do estas epokfara en la historio de nova Ĉinio.

Tamen pro la vasteco de la lando kaj ĝia loĝantaro kaj la grandaj diferencoj de kondiĉoj, kiuj ekzistas inter diversaj regionoj, estas necble okazigi la elektojn en la sama tempo, aŭ eĉ en tre mallonga periodo ĉe ĉiuj bazaj rangoj. La elektoj tial daŭros dum multaj monatoj. Kvankam kelkaj elektoj okazis pli frue en aprilo de tiu ĉi jaro kaj ĉiuj preparoj por elektado—popola nombrado, registrado de voĉdonantoj ktp.—fundamente kompletigis en aŭgusto, la elektoj por la plej malsuperaj lokaj registaroj kompletigos nur ĉe la jarfino aŭ komence de la venonta printempo. La plejmulto de ĉinaj elektantoj, la kamparanoj, kiuj konsistigas 80 procentojn de la loĝantaro, komencos balotadon nur post la finiĝo de la aŭtuna rikolto. La urba loĝantaro entute pli frue okazigos la elektojn.

Bonaj Preparoj

Samtempe kun la proklamiĝo de la Elekta Leĝo la 1-an de marto, kiun preparis komitato estrata de Ĉou En-laj, ĉefministro de la Registara Administra Konsilo, la Centra Popola Registara Konsilo fondis la Centran Elektan Komitaton estratan de Liu Ŝaŭ-ĉi, Viceprezidanto de la Centra Popola Registaro kaj sub ĝia gvido, lokaj organoj fondiĝis por zorgi pri la elektaj aferoj por ke la elektoj estu efektivigataj bonorde kaj ĝustatempe. Pli ol miliono da kadroj estas speciale edukitaj por certigi ke la elektoj estu bone plenumitaj. Ili estas asignitaj kien ajn oni ilin bezonas en urbeto aŭ kamparo aŭ en naciminoritataj regionoj, por helpi la popolon okazigi la elektojn. Elektaj komitatoj fondiĝis en la 29 provincoj kaj 14 grandaj urboj kaj en la plejmulto el la pli ol 2,000 gubernioj kaj malgrandaj urboj de Ĉinio. Miliono da ekzempleroj de la Elekta Leĝo kaj gvidlibroj pri elekta laboro estas eldonitaj kaj dis-

tribuitaj. Ĉi tiuj inkludas ekzemplerojn en la mongola, ujvura, Tibeta kaj aliaj naciminoritataj lingvoj.

Alia helpo por ĝusta preparado de la elektoj estas okazigi serion da fruaj elektoj ekde aprilo en centoj da elektitaj distriktoj en multaj partoj de la lando. Tiuj ĉi elektoj—ili ja estas parto de la universala elektado, kvankam ili okazis pli frue ol la aliaj—provizis al la sekvantaj elektoj valorajn spertojn. En la venontaj monatoj ĉi tiuj spertoj povos esti plene utiligataj, kiam la elektoj komenciĝos tra la tuta lando.

En Nordorienta Ĉinio, kie la preparado de ĉi tiuj fruaj elektoj komenciĝis iom pli frue ol en aliaj regionoj, ili estas jam okazigitaj en preskaŭ ĉiuj provincoj en mez-julio. En Seĉuan-provinco, Sudokcidenta Ĉinio, ili jam okazis en pli ol 140 *ŝjang-oj*, urbetoj kaj urbaj distriktoj. En Ĉekiang-provinco, Orienta Ĉinio, delegitoj estas elektitaj en la plejparto de ĉi tiuj fruaj *ŝjang-aj* kaj urbataj elektoj kaj preparoj nun progresas por kunvoko de la lokaj popolaj kongresoj. En aliaj regionoj de la lando, tiaj elektoj estas jam okazigitaj aŭ jam en preparo. Elektoj okazis de aprilo ĝis junio en 1,600 elektaj distriktoj. Je mez-julio aktivaj prepar-laboroj kiaj klarigado, popol-nombrado, kaj registrado de elektantoj, estis jam aranĝitaj en ĉiuj regionoj.

Granda Entuziasmo

La okazigitaj elektoj montris kiel alte la ĉina popolo taksas la demokratiajn rajtojn, kiujn ili gajnis post sia longa kaj persista batalado por liberigo. Ĉie la elektoj rezultigis je nova altiĝo de politika aktiveco. En multaj fabrikoj en Ŝanhajo kaj aliaj industriaj centroj, gajaj kunvenoj okazis kiam la atestiloj por la elektantoj estis disdonataj. En la malnovaj revoluciaj bazoj en pli ol 200 *ŝjang-oj* kaj urbetoj de Ĵuĝin, Ŝingĝo kaj 22 aliaj gubernioj de Kiangsi-provinco la kamparanoj studis kun granda intereso la diversajn dokumentojn pri la elektado kaj entuziasme partoprenis en elektaj kunvenoj kaj diskutoj.

La entuziasmo de la industriaj laboristoj estas esprimita en la slogano kiun ili adoptis tra la lando: "Ni bonvenigu la universalan elektadon per pligo de la produkto!" Produkto-konkursaj kampanjoj estas pli entuziasme subtenataj en fabrikoj, kies laboristoj kaj funkciuloj partoprenas en la elektoj. En Ŝenjang-a Kemia Fabriko, la eduka influo de la elektado ege stimulis produktadon. La ĉiutaga produktokvanto de la laborejo n-ro 514 de ĉi tiu fabriko plialtiĝis 30 procentojn jam en la unuaj tagoj de la kampanjo. Laboristinoj de la Ĝiĝenga Tekstura Tinktura-Fabriko en Ŝanhajo faris garantian okazaĵon de la elekto-kampanjo por plifortigi labor-disciplinon kaj plibonigi la kvaliton de siaj produktajtoj. Ili pliiĝis la produktokvanton de la unua-grada ŝtofo. Membroj de pli ol 50 laborgrupoj en Tienzina Popola Presejo bonvenigis la elektadon per praktikaj agoj—ili plibonigis produktadon. Konkursaj kampanjoj honore al la elektado

**Ŝjang*—administra unuo sub gubernio. Ĝi konsistas el kelkaj vilaĝoj.

progresas inter la laboristoj de multaj aliaj entreprenoj.

La ĉeestprocento de la elektantoj estas viva ilustraĵo de la entuziasmo elmontrita de la popolo. Laŭ statistiko de 25 ŝjang-oj, kaj urbetoj en naŭ provincoj, meznombro pli ol 80 procentoj de la tuta elektantaro iris al la balotoj. Kaj unu-kaze 99.3 procentoj de la elektantoj voĉdonis.

Festa atmosfero regis dum elektaj tagoj. La popolanoj surmetis siajn plej bonajn vestojn, alpinglis siajn atestilojn por elektantoj kaj ruĝajn florojn al siaj jakoj kaj bluzoj kaj iris al elektaj kunvenoj en bonordaj vicoj akompanate de la muziko de tamtamoj kaj tamburoj. Virinoj de naci-minoritatoj sin vestis per siaj plej belaj naciaj kostumoj por iri al la kunvenoj.

Tiu ĉi konscienco pri voĉdono pariĝas kun la zorgemo per kiu la popolo elektas siajn delegito-kandidatojn. En Jakoŭ-vilago, Ĝjangĝin-gubernio, Seĉuan-provinco, la nuntempa reprezentanto estis proponata kiel kandidato. Li estis aktiva kaj respondema en sia laboro, sed li havis unu difekton—troa abrupteco en traktado kun homoj. Dum la diskutado pri la nomado li parolis antaŭ la elektantoj kaj faris memkritikon pri sia laborstilo. Lia aŭdantaro kontentigis ke li rekonas sian difekton kaj nepre klopodos korekti ĝin. Ili restigis lian nomon sur la listo de la kandidatoj.

La elekto, kiuj nun okazas, estas intime kunligitaj kun la batalado kontraŭ burokratismo kaj ĉiuj ofendoj al la demokrata vojo por aranĝi aferojn. Ĉio, kio ofendas la popolan leĝon kaj disciplinon, estas senindulge atakata de la elektantoj. La popolo estas aktiva en kritikado pri la mankoj, kiujn ili trovis, kontrolante la laborojn de la registaro kaj individuaj kadroj. La elektoj helpas forigi el la ŝtataj aparatoj la malbonajn elementojn de ĉiuj specoj.

Konfido al Komunista Partio

Ĉi tiuj unuaj elektoj montris la grandan konfidon de la popolo al membroj de la Komunista Partio, al la granda amaso da kadroj de la bazaj unuoj de la registaro kaj al tiuj, kiuj sin montris modeloj en produktado laboro.

En kvin ŝjang-oj de Seĉuan-provinco, 80 procentoj de ĉiuj delegitoj elektitaj estas malsuperaj registaraj laborantoj. El 31 delegitoj elektitaj en Ŝansji-ŝjang de Fejŝji-gubernio, Anhŭej-provinco, 9 estas membroj de la Komunista Partio aŭ la Novdemokratia Junula Ligo. La kamparanoj de Ĉengŝi-vilaĝo, modela riĉrikolta vilaĝo de Hajlun-gubernio, Hejlungkiang-provinco, metis la modelan registaran laboranton Ma Ĝuang-tjan ĉe la kapo de la listo de kandidatoj kaj unuanime elektis lin. Li Kaj-ĉen, modela agrikulturisto de Seĉuan-provinco, estas elektita per absoluta plejmulto de Nanlung-ŝjang, Nanbu-gubernio, Seĉuan-provinco.

Njanpan-ŝjang, Nanĝjang-gubernio, Seĉuan-provinco estis iam parto de la Seĉuan-Ŝensi-limregiona revolucia bazo. Ĉi tie triono el la delegitoj elektitaj estis familianoj de batalantoj de la Ĉina Ruĝarmeo, kiuj donis siajn vivojn en la revolucia batalo aŭ familianoj



Balotantoj en Juŝu-gubernio, Kirin-provinco, Nordorienta Ĉinio, aklamas nove elektitan delegiton.

de batalantoj en la Popola Liberiga Armeo, aŭ tiuj, kiuj mem batalis en la Ruĝa Armeo aŭ geril-taĉmentoj.

Ĉi tiuj estas la tipaj delegitoj elektitaj de la popolo, geviroj, kiuj atingis la popularecon ĉe la popolo per sia aktiva kaj sindona laboro en produktado aŭ defendo por la popolo, kiel gvidantoj aŭ aktivuloj en diversaj grandaj amas-movadoj, kia la movado rezisti Usonan agreson kaj helpi Koreion kaj la movadoj kontraŭ ĉiuspecaj korupto, malŝparo kaj burokratismo.

Ĉie troviĝas virinoj inter la elektitaj delegitoj. Ili konsistigas 21 procentojn de ĉiuj elektitoj en Hopej-ŝjang, Ĝjangning-gubernio, Kiangsu-provinco. En regionoj, kie diversaj nacioj kune vivas, la plej bonaj reprezentantoj de ĉiu nacio estas elektitaj. En Ĉen-ljang-ŝjang, Kuejĝu-gubernio, Kuejĉoŭ-provinco, la nombro de delegitoj de ĉiu nacio konformas al ĝia proporcio en la tuta loĝantaro.

Aliaj delegitoj inkluzivas la plej bonajn instruistojn, kuracistojn, progresemajn industriistojn kaj komercistojn kaj reprezentantojn de diversaj religiaj grupoj. Ĉiuj ĉi tiuj iam entuziasme surŝultrigis la honorajn taskojn, kiujn la popolanoj konfidis al ili.

Tio multe plifortigis la lokajn administrajn organizojn, la kunligon inter la registaro kaj popolo, plibonigis la labor-metodojn kaj moralon de ĉiuj kadroj de la registaro kaj plialtigis ĝian efikon. Tio sin manifestis en ĉiuj distriktoj, kie la popolaj kongresoj okazis kaj eklaboris post la elektoj.

La nove elektitaj delegitoj estas aktivaj en la gvidado de la popolanoj en produkta laboro. La unua kunsido de la nova popola kongreso de Jufung-ŝjang, Sujning-gubernio, Seĉuan-provinco, laŭ la postulo de la popolo, koncentrigis sian atenton en produktajn problemojn de vitala loka intereso. Ĉi faris rezolucion, ke la plej grava tasko de la popolaj reprezentantoj en la venontaj du monatoj estu gvidi la popolamason en la

batalo kontraŭ sekeco kaj organizi la kolektadon kaj konservadon de akvo por irigacio. Ĝi ankaŭ aprobis planon prezentitan de delegito Daj Haj-ĉeng por la konstruado de akvokonservejo en la ŝjang.

La ŝjang-kadroj de Ĵŭenan, Tajcang-gubernio, Kiangsu-provinco, fariĝis multe pli aktivaj en sia laboro post la elekto. Ili ĵetis sin tutkore en la organizadon de portempaj interhelpaj grupoj por la rikolta sezono, kun la rezultato ke la somera rikolto tra la ŝjang estis finita en kvar tagoj.

La sperto de ĉi tiuj fruaj elektoj estas atenteme aplikata, kiam la elektoj disvastiĝas de unu regiono al la alia. Ĉe la fino de septembro, kvinono de la loĝantaro de Sudokcidenta Ĉinio aŭ ĉ. 15 milion popoloj elektos siajn delegitojn por la lokaj populaj kongresoj. En Centra-Suda Ĉinio kie elektoj kompletigis en aŭgusto en 1,000 vilaĝoj, triono de la 76,000 vilaĝoj de la regiono preparas por balotado. En Kiangsu-provinco, Orienta Ĉinio, elektoj okazas en 4,200 ŝjang-oj kaj urbetoj kun tuta loĝantaro nombranta 10 milionojn. En Nordorienta Ĉinio, elektoj komenciĝis en ĉiuj ses provincoj kaj kvin grandaj urboj.

Profundiĝanta Demokratio

Dum la kvar jaroj depost la fondiĝo de la Ĉina Popola Respubliko, la ĉina popolo sub la gvidado de la Komunista Partio kaj Prezidanto Maŭ Ze-tung sukcese faris serion da grandaj demokratiaj reformoj, kiuj ebligis plenan disvolvon de la krea kaj inventa kapabloj de la popolamaso en restarigo kaj disvolvo de

nacia ekonomio kaj nacidefendo. Paŝon post paŝo, la popol-demokrata diktatoreco estas firmigita kaj disvolvita per sistemo de konferencoj de populaj reprezentantoj. Ĉis nun la nombro de la popolanoj, kiuj partoprenis en ĉiurangaj konferencoj de reprezentantoj superis 13,637,000, el kiu pli ol 80 procentoj estas elektitaj rekte aŭ nerekte de la popolo, kaj 75 procentoj estas laboristoj kaj kamparanoj.

Tio ĉi estas la potenca demokrata fundamento, sur kiu la ĉina ŝtato tiel rapide progresas en ĉiu sfero de penado.

Nun la periodo de ekonomia restarigo jam finiĝis kaj la periodo de planita ekonomia konstruado komenciĝis. Surbaze de la ege leviginta politika konscio kaj la organiza kapablo de la popolo kaj la sukcesoj atingitaj en la pasinteco, la tempo estas matura por plua paŝo al demokratigo kiun prezentis la landskala elektado bazita sur universala voĉdonado.

La Elekta Leĝo de la Ĉina Popola Respubliko provizas la vere demokratian elekteman sistemon taŭgan por la kondiĉoj nun superregantaj en Ĉinio. Ĉiu civitano kiu atingis la aĝon de 18 havas la rajton elekti kaj esti elektata sen la kondiĉoj de nacieco, raso, sekso, profesio, socia origino, religio, eduko, propraĵo-stato aŭ restado. Esceptoj estas faritaj nur en malmultaj kazoj de bienuloj kies klasa rango ankoraŭ ne ŝanĝiĝis, homoj senigitaj je politikaj rajtoj kaj la mensmalsanuloj.

La elektoj nun okazantaj estos granda paŝo al la plua levigo de la bonstato kaj kultura nivelo de la popolo.

Kurantaj Aferoj

Pekina Eduka Centro en Konstruado

Granda eduka centro, ĉirkaŭ du trionoj de la grandeco de Pekin-urbo, nun estas konstruata en ĝia okcidenta ĉirkaŭurbo. Duon-miliono da studentoj, instruistoj, scienculoj kaj administraj laborantoj el ĉiuj partoj de la lando ĉi tie studos kaj laboros. Ĝi fariĝos la plej koncentrigita akademia centro en la lando por eduki teknikistojn por ĉiu kampo de nacia konstruado de Ĉinio.

En la pasintaj tri jaroj, pli ol 400,000 kvadrataj metroj da konstruo de ĉi tiu giganta projekto jam estas kompletigitaj. Du novaj universitatoj estas starigitaj: la Popola Universitato de Ĉinio, la plej granda instituto por edukado de laborantoj en la kampo de financo kaj ekonomio, kaj la Centra Instituto por Naciaj Minoritatoj, instituto por eduki minoritatajn laborantojn, kiu jam havas studentojn el 47 diversaj nacioj.

Konstruado de tiu ĉi jaro ampleksas 450,000 kvadratajn metrojn. Inter la lernejoj nun konstruataj estas institutoj de fero kaj ŝtalo, aeronautika inĝenierado, petrolo, geologio, inĝenierado, min-ekspluatado, agrikulturo, forstigado, fervojoj, politika scienco kaj leĝo, akvokonservado, meteorologio kaj poŝt- kaj telekomunikoj, kaj ankaŭ la Akademio de Sciencoj, Pekina Medicina Kolegio, la Centra Konservatorio kaj la Pekina Kolegio de Instruistoj.

Por plenumi la bezonon de ĉi tiu disvolviĝanta eduka centro, la Pekina Municipala Registaro sendis 10,000 laboristojn konstrui modernajn kloaksistemojn,

vojojn kaj ŝoseojn en tiu ĉi distrikto. Nova ŝoseo, paralela al la nuna de Pekino al la Somera Palaco, estas konstruita. Ŝarĝveturila relvojo estas surmetita por transporti la konstantan fluon da konstru-materialoj.

Post finkonstruo, 30 universitatoj, esploraj institutoj kaj teknikaj lernejoj estos ĉi tie lokitaj, etendiĝante laŭlonge de la pitoreska vojo de okcidenta pordego de Pekino al la Somera Palaco.

Pli da Popolanoj Ŝparas Pli da Mono

La sumo de la ŝpardeponoj en la Pekina Popola Banko estis 65 procentojn pli alta en la dua duono de septembro ol en la pasinta monato. Tiu ĉi estas parto de la ĝenerala tendenco al kreskaj ŝparoj flanke de multiĝantaj deponantoj.

La ŝpardeponoj en Pekino pliiĝis je 120,000 kontoj ĉijare. La tuta sumo de ŝpardeponoj en la unuaj naŭ monatoj ĉijare superas la sumon de 1952 je 12 procentoj.

Prenu 1949 kiel 100, do ŝpardeponoj en Pekino staris je 890 en 1952. Tio ĉi saltis ĝis 1,225 en la pasintaj naŭ monatoj. Simile, la sumo de privataj ŝpardeponoj en la Popola Banko en Ŝanhajo estis 42-oble plimulta ol en 1949 ĉe la fino de septembro.

Kreskantaj nombroj da laboristoj kaj ŝtataj funkciuloj malfermas por si depono-kontojn, kiam altiĝas ilia vivnivelo. Popolanoj ne senutile tenas sian restantan monon en mano sed enbankigas ĝin por helpi rapidigi la grandskalan ekonomian konstruadon de la lando.

Kurantaj Aferoj

Por la Venko de Mondpaco kaj Prospero de Popola Kulturo

Resumo de parolado de Kuo Mo-ĵo, prezidanto de Ĉina Popola Komitato por Defendo de Mondpaco, ĉe kunveno memoriganta la kvar eminentulojn de monda kulturo en Pekino je la 27a de septembro, 1953.

Kun fido pri la venko de paco kaj respekto al la kultur-heredo de la homaro, la ĉina popolo akceptis la proponon de la Monda Packonsilo memorigi en 1953 la kvar grandajn eminentulojn de internacia kulturo: Ĉju Jŭan de Ĉinio, Nicolaus Copernicus de Pollando, Francois Rabelais de Francio kaj José Martí de Kubo.

Neniam mortos la spirito de tiuj ĉi kvar grandaj kontribuintoj kaj subtenintoj de la homara kulturo. Ĉju Jŭan forpasis antaŭ 2230 jaroj, Copernicus antaŭ 410 jaroj, Rabelais antaŭ 400 jaroj, kaj se José Martí ankoraŭ vivus, li ankaŭ aĝus 100 jarojn, tamen ili daŭre vivas en la koroj de la popoloj tutmondaj. Ili naskiĝis en malsamaj epokoj kaj malsamaj landoj, tamen ili ĉiuj luktis dum sia tuta vivo por la justeco kaj progreso de la homaro kaj ilia kreema laboro aldonis al la homa kulturo valorajn heredojn. Iliaj idealoj, laboroj kaj luktoj ligiĝis kun la intereso de la popoloj de iliaj tempoj kaj landoj kaj ankaŭ ligiĝas, el la vidpunkto de la speciala historia signifo de ilia vivo, kun la nuna intereso de la tutmondaj popoloj.

Lastjare ni memorigis Hugo, da Vinci, Gogol kaj Avicenna kaj ĉijare ni memorigas tiujn ĉi kvar grandajn kulturajn eminentulojn. Ni profunde sentas ke, sub la nomoj de tiuj kulturaj gigantoj de la mondo, ni havas plenan fidon kaj grandan respondecon heredi kaj disvolvi iliajn superajn kulturajn tradiciojn por ebligi la efektiviĝon de ilia komuna celo—la alta celo de interpopola amikeco, libera vivo kaj daŭra paco.

Ĉju Jŭan

El la kulturaj gigantoj memorigataj de tiu ĉi kunveno la unua estas Ĉju Jŭan de Ĉinio.

Ĉju Jŭan estas la unua granda patriota poeto de Ĉinio. Dum sia tuta vivo li ege sopiris al libero kaj justeco, arde amis sian patrolandon kaj popolon, abomenis la koruptan, nekapablan regantan klason kaj oferis sian vivon al sia idealo. Lia verkaro naskis profundan kaj longdaŭran influon en la disvolvigo de ĉina literaturo, starigante brilan ekzemplon por la postvenantaj poetoj. Dum pli ol 2000 jaroj la patriota pasio esprimita en liaj poemoj ĉiam donis novan, stimulan forton al divers-epokaj legantoj.

Kvankam Ĉju Jŭan estis posteulo de iu nobelo de Ĉu-regno*, lia verkaro havas karakteron profunde popolan, pro tio ke li longe interrilatis kun la popolo.



Kuo Mo-ĵo faras paroladon ĉe la memoriga kunveno

En la kortego de Ĉu, li faris akran lukton kontraŭ la nobeloj, kiuj facilanime kompromitis la interesojn de la popolo por sia propra profito. Malfeliĉe Reĝo Hŭaj de Ĉu-regno estis nekapabla reĝo, frivola kaj aroganta. Li ne nur ne akceptis la prudentan konsilon de Ĉju Jŭan por faciligi la suferojn de la popolo sed kredis la kalumnion de sia malnobla ĉirkaŭantaro, pli kaj pli lin fremdigis kaj finfine ekzilis. En la sekvintaj pli ol 20 jaroj Ĉju Jŭan vivis malĝoje kaj indigne en sia lando kiel ekzilito. Dum Reĝo Hŭaj sin lulis meze de la reakcia nobelaro, kondukis luksan kaj voluptan vivon, agis malsaĝe kaj riskeme ke Ĉu-regno falis rezulte de lia misregado, Ĉju Jŭan dronis en treege profunda doloro kaj ĉagreno.

Dum sia ekzilo li konstante esprimis sian altan idealon kaj profundan amon al la patrolando kaj popolo per sia poezia verkado. Ĉju Jŭan, la verkinto de la senmorta *Li Saŭ* (*La Lamento*), ne nur gajnis grandan simpatian de la popolo de Ĉu-regno sed ankaŭ estas neniam apartigebla de la glora kultura tradicio de la tuta popolo de Ĉinio.

La poemaro de Ĉju Jŭan estas kara trezoro en la heredo de ĉina klasika literaturo kaj estas unu el la grandaj kontribuoj fare de ĉina popolo al la homara kulturo. La popola karaktero kaj patriota spirito elmontrita de lia verkaro jam ricevis novan signifon en nia

*Ĉu-regno estis granda regno en la baseno de Jangzi-rivero dum la Periodo de Militantaj Regnoj (403-221 a. K.) en la ĉina historio.

nuna epoko kaj akiris plenan forton por venki la krimajn influojn.

Copernicus

Hodiaŭ estas de ni memorigata ankaŭ Nicolaus Copernicus de Pollando, ĉi tiu pioniro de moderna naturscienco. Antaŭ pli ol 400 jaroj la mezepoka feŭdisma reganta forto de Eŭropo kaj ĝia subtenanto, la katolika eklezio, kreis malluman karceron por la homa ideologio utiligante teologion kaj ĝian lakeon, skolastikan filozofion. El tiuj viglaj, kuraĝaj herooj batalantaj kontraŭ la putranta mezepoka kulturo, Copernicus estis la plej elstara en la naturscienca rondo. Li estis multekapabla kaj havis vastan scion. Li estis distinginda matematikisto, fama ekonomiisto kaj populara kuracisto; li konis dinamikon kaj topografion kaj sciis la latinan kaj grekan lingvojn kaj ĉiajn antikvajn artojn; li estis ankaŭ pentristo kaj socia aktivulo. Sed tio kio faris lian nomon eterna estas lia granda kontribuo al astronomio. Lia grandioza verko *De Orbium Coelestium Revolutionibus* (*Pri la Revoluo de la Ĉielaj Korpoj*) havanta tutmondan historian signifon rompis la karceron de la mezepoka teologio, liberigis la racion de la homaro kaj proklamis venkon de la scienco.

La granda eltrovo de Copernicus pri la revoluo de la terglobo ne nur multe antaŭenpuŝis la disvolvon de astronomio sed pli grave estas ke ĝi pligrandigis por la homaro la eblecon koni la mondon, metis fundamenton por korekta koncepto pri la universo kaj tiel malfermis novan epokon por la natura scienco.

Rabelais

El la grandaj batalintoj por la civilizacio kaj progreso de la homaro ni ne povas forgesi Francois Rabelais, humanisto de Francio. Kiel elstara satiristo li kuraĝe laŭdis per sia epope-simila novelo *Gargantua et Pantagruel* la heroan batalon de la progresema socia forto de la mezepoka okcidenta Eŭropo kontraŭ la maluma regado de feŭdismo. En tiu ĉi ĉio-enhava verkego kiun li skribis dum 20 jaroj Rabelais ekzakte skizis la verajn figurojn de insidemaj senkoraĵoj aŭtokrataj regantoj, de hipokrituloj kaj pseŭdokleruloj. Eĉ hodiaŭ la granda realisma forto de tiu verko ankoraŭ radias freŝajn brilojn. Tia akra sarkasmo kontraŭ la agresantoj ĝojigas kaj stimulas ankaŭ la hodiaŭan pacan homaron.

Rabelais, la granda realisma verkisto de Francio, superpaŝinte sian epokon, staras kune kun ni kaj partoprenas novan justan batalon. Lia malestimo kaj malŝato al milito kaj agreso hodiaŭ mobilizas pli grandan forton; lia antaŭdiro pri la feliĉa estonteco de la homaro hodiaŭ jam komencis realiĝi.

José Martí

Laste ni volas memorigi José Martí de Kubo, alia estimata "heroldo de libero". José Martí kreskis en Kubo sub la regado de hispanaj koloniistoj kaj memspertis ilian subpremadon kaj humiligon. En la aĝo de 16 jaroj li jam estis punita per deviga laboro pro sia patriotismo, revolucia agado kaj estis poste plurfoje enkarcerigita kaj ekzilita. Sed José Martí persistis en sia idealo por la liberigo de la suferanta Kuba nacio kaj per sia verkado kaj praktika agado instigis la Kuban nacion al revolucia batalo por libero kaj sendependeco.

Li metis la fundamenton por la revolucia partio de Kubo kaj fine glorie oferis ĉion de si al la popolo en la Kuba liberiga batalo de li organizita. Kvankam lia entrepreno ankoraŭ ne tute realiĝis hodiaŭ, lia nomo tamen jam fariĝis en la koro de Kuba popolo standardo por batalo. En siaj verkoj José Martí plene elmonstris siajn kvalitojn de revoluciulo kaj liaj poemoj estas saturitaj de profunda amo al la popolo, arda pasio por batalvivo kaj firma kredo pri la venko. El liaj flamasaj versoj la popolo ĉiam povas ĉerpi konvinkon kaj forton por kontraŭbatali maljustecon kaj akiri liberon. José Martí iam diris: "La estonteco dependas de paco!" Tiu ĉi klara batalvoko trovas hodiaŭ entuziasman eĥon de la tutmondaj popoloj.

Komuna Heredo

Ĉju Ĵuan, Copernicus, Rabelais kaj José Martí vivis en malsamaj epokoj sed en la kultura historio de la homaro ili brilas same eterne kaj bele kiel la steloj en la ĉielo. Iliaj valoraj kulturaj heredoj fariĝis komuna havaĵo de la tuta progresema homaro. Ilia sinofera spirito en serĉo de la vero kaj en servo al la popolo estas ĉiam estiminda kaj imitinda.

Memorigante tiujn ĉi kvar kulturajn gigantojn, ni profunde sentas ke la bela estonteco de la tuta homaro estas la komuna celo de la estintaj kaj estantaj noblaj kultur-batalantoj de ĉiuj nacioj. Tial, estimi kaj disvolvi la bonajn kulturajn tradiciojn de ĉiuj nacioj kaj akceli la interŝanĝon de diversnaciaj kulturoj estas nepra kondiĉo por pliiĝi la komprenon kaj amikecon inter la nacioj, pliriĉigi kaj plialtigi la homaran kulturon kaj akiri longdaŭran mondpacon.

Hodiaŭ, kiam ni memorigas Ĉju Ĵuan, Copernicus, Rabelais kaj José Martí, ni ne povas ne atenti la situacion en kiu nun troviĝas la homaro kaj kulturo. Ni ne povas ne vidi ke la malamiko de paco instigas ĉie militojn, subfosas la pacmovadon kaj senhonte malhelpas la liberan evoluon kaj ekonomian kaj kulturen interŝanĝon de diversaj nacioj. Ili malŝatas la progreson kaj liberon de la homaro, persekutas la konsciencon de la artistoj kaj sciencistoj, kaj piedpremas kaj ruinigas la homaran kulturon. La materia kaj kultura vivo de la homaro suferas nun severan provokon de la militinstigantoj.

Rilato inter Paco kaj Kulturo

Ni memorigas la kvar grandajn internaciajn kulturajn eminentulojn en la tempo kiam jam realiĝis la korea armistico dezirata de la tutmondaj popoloj, kaj tial ni devas plie emfazi la intiman rilaton inter paco kaj kulturo. Defendi mondpacon per kultura interŝanĝo estas unu el la gravaj klopodoj de la monda pacmovado en la pasintaj pli ol kvar jaroj. Sed la senĝena kultura interŝanĝo inter nacioj, same kiel ekonomia interŝanĝo, havas plenan eblecon nur en paco. Se paco suferas minacon aŭ eĉ detruon, kultura interŝanĝo kaj disvolviĝo certe estas malhelpata kaj piedpremata. Pro tio la batalo de pacdefendo estas neapartigebla de la batalo de kultur-defendo. En tiu ĉi kunveno ni devas alvoki al la tutmondaj popoloj: koncentrigu la fortojn de la monda publika opinio por firmigi la korean armisticon, ĉesigi la ceterajn ekzistantajn militojn kaj forigi ĉiajn militajn minacojn. Ni insistas pri intensigo de diversnacia kultura interŝanĝo

(daŭrigo sur p. 249)


Nova Ĉinio Kantas

Marie Majarova

Estrino de la Ĉeĥoslovaka Kultura Delegacio

Je la afabla invito de la Ĉina Registaro, la Ĉeĥoslovaka Kultura Delegacio venis por celebri la Nacian Tagon de Ĉinio kune kun la ĉina popolo. Ili venis por priĝoji kune kun la ĉina popolo iliajn sukcesojn en plenumado de diversaj konstru-projektoj de la unua jaro de ilia kvinjara plano.

El la novaĵoj al kiuj ni donas nian absorbitan atenton kaj el la juna ĉina literaturo kun sia antikva tradicio, ni, la delegacio, informiĝis ke la ĉina popolo estas marŝanta nedevianta laŭ la vojo de nova socia ordo kun ilia tuta granda forto kaj nevenkebla energio, kun ilia tuta infekta entuziasmo kaj memfido. Sed la sceno de la Oktobro-unua parado, kiu tiel vivece esprimis la ĝojon ŝprucantan el la fundo de ilia koro dum la celebrado de la naskiĝo de la popol-demokrata Ĉinio, estas sceno kiu superas ĉies atendon.



Vivuo kaj gojkrioj leviĝas en la aeron el la multkoloraj kolonoj de junaj pioniroj.

Ĝi estis granda, unuigita, harmonia horo kiun Ĉinio kun siaj centoj da milionoj da popolanoj prezentis al ni pere de sia popolo en Pekino.

La kolonoj de popolanoj en la Oktobro-unua parado estas kantantaj; la sono de ilia kantado leviĝas alten en la nubojn kaj solviĝas en la aero de la frua mateno. Ili estas kantantaj al la brilaj, belaj, ruĝaj flagoj kiuj flugas super la antikvaj urbo-turoj kaj -pordegoj. La dekoracioj sur tiuj urbo-turoj estas tiel lerte faritaj ke ili pliiĝas ilian antikvan arkitekturan belecon.

Ni aŭdas la milit-kantojn de la brava ĉina popola armeo. Ĉiu el ĝiaj anoj estas heroo kaj ilia kanto leviĝas en potenca melodio. La muĝado de la armiloj en la mano de la ĉina popolo servas kiel averto al la imperialistoj. En la regula, unueca paŝado de tiu ĉi armeo ni povas aŭdi la eĥon de la paŝoj de la heroo Longa Marŝo de la ne malproksima estinteco. Tiu ĉi armeo estas kara al la koroj de la patrinoj de la tuta mondo, ĉar ĝi estas armeo por paco. Ĝi batalas nur por defendi pacon; ĝi batalas nur por la feliĉo de sia propra popolo. La tankoj rulbrue kuras sur la tero; aerŝprucaj aeroplanoj zumas en la ĉielo. Ili laŭte kantas. Tiuj ĉi melodioj plenigas la korojn de la rigardantoj per firma konfido kaj neskuebla kredo pri la defendo de paco.

Arbaro da flagoj flirtas super la amaso, super la ĉarmaj, sun-brunigitaj vizaĝoj de la laboranta popolo. Ili ankaŭ kantas. Tiu ĉi estas kanto de laboro, garantio por la estonteco. Inter la ĉielarkaj koloroj ni ankaŭ vidas la standardojn de ĉiuj pacamaj nacioj.

Floroj svingiĝas alte kaj kantoj leviĝas kun ekscito dum la geknaboj aklamas al la gvidantoj de Ĉinio. La gajaj ondoj de la aklamado kaj kantado de la geknaboj miksiĝas kun la trembrilantaj koloroj de rozoj, peonioj kaj krizantemoj. Ilia kanto leviĝas alten, al ilia amata Maŭ Ze-tung. Ili fiksas sian rigardon sur la vizaĝon de Prezidanto Maŭ, kiu radias per inteligenteco kaj bonkoreco. Li ridetas al ili kun granda afableco.

Dum tiuj ĉi tagoj de celebrado, ĉio estas kantanta. Melodioj de ĝojo ŝvebas en la aero. La stratoj de Pekino eĥe resonas kun la bruo de dancantaj paŝoj. La ĉarmaj ekbriloj de fajraĵoj fulmadis en la nokta ĉielo super Pekino—eĥe tiuj ĉi blujaj, verdaj kaj ruĝaj fajreroj estas kantantaj, al la liberigo kaj al la popola gvidanto. La tuta Ĉinio estas kantanta ĉar la bonevestita kaj bone-nutrita popolo jam forlasis post si la tagojn de malsato, de krueleco, de malriĉeco kaj humiligo.

La kantoj de la Unua de Oktobro ŝvebas en la aero—kantoj de liberigita ĝojo. Ili estas fiere enkondukantaj la ĝojan estontecon de la ĉina popolo.

Sukcesoj de la Ĉina Popolo en Irigacio

Ĝang Zi-lin—Estro de la Irigacia Buroo de la Ministerio de Akvokonservo

La rapida disvolvigo de la agra irigacio estas unu el la gravaj faktoroj, kiuj kondukis la agrikulturan produktadon al grandaj sukcesoj post la fondiĝo de nova Ĉinio. Dum la mallonga periodo de tri jaroj (1949-1952), krom la fundamenta ripariĝo de malnovaj irigaciaj instalaĵoj, tra la lando estis faritaj 358 grandaj kaj pli ol miliono da malgrandaj konstruaĵoj de irigacio (inkluzive malgrandajn kanalojn, akvokonservejojn kaj putojn por irigacio de malpli ol 500 hektaroj). La irigaciata areo en la lando plivastigis entute je pli ol 3.3 milionoj da hektaroj, precipe en Norda Ĉinio ĝi plivastigis plej rapide ĝis preskaŭ duobliĝo dum la pasintaj tri jaroj. La produkta kvanto de ĉiu area unuo en la irigaciataj regionoj ĝenerale plimultiĝis je 50-200% ol antaŭ la irigacio. Estas aplikitaj demokrata administrado de la irigaciaj instalaĵoj kaj sistemo de racia dispono de la akvo. Tiamaniere la situacio de agra irigacio en Ĉinio radikale ŝanĝiĝis.

La kamparanoj tiun ŝanĝon komprenas plej profunde. En Ĵulin-gubernio de Kuangsi-provinco la kamparanoj mokis la laborojn de "akvokonservado" fare de Kuomintang per jena popolkanto:

La korupta registaro
Nur prirabas, sen bonfaro;
"Digkonstrui!"—ĝi trompdiris,
Nian grenon ĝi forŝiris!

Hodiaŭ la kamparanoj kantas:

Dank' al Ĝjänggjun-dig-ekesto,
Niaj kampoj jam fekundas,
Kaj l' rikoltoj tre abundas,
Riĉas ni je manĝ' kaj vesto.
Maŭ Ze-tung nin amas kore
Pli ol la gefilojn siajn.
Ni aranĝu fortojn niajn
Por kulturi ek traktore.

En irigacio la ĉina popolo havis brilajn atingojn. Amasa malgrand-skala irigacio havas historion de pli ol tri mil jaroj kaj amasigis multajn spertojn, kiuj transiris kaj pliriĉigadis de generacio al generacio. Duĝjang-akvo-barilo en la okcidenta parto de Seĉuan-provinco estas unu el la grandaj irigaciaj konstruaĵoj de la antikva tempo, kiu, konstruita jam 250 jarojn antaŭ Kristo, restas uzata ĝis nun kaj irigacias pli ol 200,000 hektarojn da agro.

Tamen en la lastaj cent jaroj, kaŭze de la kruela subpremado kaj ekspluatado de la imperiistoj kaj enlandaj reakciuloj, la akvokonservado estis neglektata, la popola vivo mizeris, kaj severiĝis la katastrofoj de trosekeco. En Ŝensi-provinco, ekzemple, de 1928 ĝis 1930 daŭris severa trosekeco. Laŭ la evidente nekompleta statistiko de la reakcia registaro de Kuomintang la forfuĝintoj kaj mortintoj de la katastrofo nombris sesonon de la tiama loĝantaro de la provinco, kaj inter


ili ĉirkaŭ 300,000 virinoj estis devigitaj sin vendi kiel sklavinojn. En kelkaj severe plagitaj gubernioj, la loĝantaro reduktiĝis ĝis malpli ol duono, kaj post la katastrofo meznombro pli ol 70% de la tero restis dezerta dum 5-6 jaroj.

Post sia fondiĝo la Popola Registaro tuj envicigis la malebligon de trosekeco inter la gravajn taskojn de la ŝtato. La Ĉina Komunista Partio kaj la Popola Registaro unuflanke gvidas la kamparanojn plene utiligi la ekzistantajn instalaĵojn de irigacio kaj uzi diversajn rimedojn por grandskale bataladi kontraŭ trosekeco, kaj aliflanke rapidas fari diversajn irigaciajn konstruaĵojn por radikale elimini la trosekecon. Pro tio, la agra irigacio estas ĝenerale plibonigita kaj la irigaciata areo de trosekeco rimarkinde reduktiĝis, kio grave akcelas la rapidan kreskon de la agrikultura produktado.

Grandskala irigacia konstruado nuntempe proporcias nur 20% de la irigacia laboro en Ĉinio, sed kun la diversflanka disvolvigo de radikala subjugo de riveroj kaj utiligo de akvaj riĉfontoj, sendube ĝi fariĝos grava punkto en la estonteco. Inter la grandaj irigaciaj konstruaĵoj nove starigitaj en Ĉinio dum la pasintaj tri jaroj, jenaj estas la plej gravaj:

La konstruaĵo ĉe la malsupra parto de la Flava Rivero—kiu la unua en la historio kondukas la akvon de la Flava Rivero en Ŭej-riveron por irigacii la agrojn sur ambaŭ bordoj de la lasta. Nun la irigaciata areo ampleksas 32,000 hektarojn, kaj estonte ankoraŭ kreskos super 60,000 hektaroj.

La ĉefaj konstruaĵoj de la Ĝenerala Irigacia Kanalo de norda Kiangsu ĉe la malsupra parto de Huaj-rivero (la longa je 170 km. trunka kanalo kaj giganta en-



Irigacia instalaĵo en Ĉouŝan-ŝjang, Tajŝan-gubernio, Kuantung-provinco.

fluiga kluzdigo) jam estas pretaj. La irigacia kanalo ankau estos konstruita laŭvice. Kiam la tuta konstruo estos finita, ĝi irigacios areon ampleksantan milionon da hektaroj, kaj kiel la unua granda konstruaĵo de irigacio ĝi fariĝos ekzemplo en la estonta disvolvo de la irigacia laboro en nova Ĉinio.

Huangjang-kluzo ĉe la supra parto de la Flava Rivero en okcidenta Sujĵan-provinco—kiu provizas per reguligebla akvo la malnovan kanalon, kiu irigaciis 73,000 hektarojn. Kiam la malnova kanalo estos reordigita, la irigaciata areo atingos 167,000 hektarojn.

La rapida plenumo de la supre diritaj grandaj konstruoj efektiviĝas dank' al la penado de la registaro kaj teknikaj laborantoj kaj la helpo de Sovetiaj specialistoj, tamen ĉefa faktoro estas la alta laborentuziasmo de la kamparanoj kaj laboristoj, kiuj memvole partoprenis la konstruadon laborante por sia propra bela morgaŭo. La kamparanoj kaj laboristoj estas bone pagataj de la registaro kaj sur la konstruejoj ĝuas abundan kulturen vivon kaj medicinan bonzorgon.

La rapida diskonigo de progresaj spertoj—inkluzive la progresajn labormetodojn de Sovetio—kaj la elmeto kaj apliko de grandnombraj raciigaj proponoj sur la konstruejoj multe plialtigis la laborefikon. Ekzemple, dum la konstruado por konduki la akvon de la Flava Rivero en Ŭej-riveron, la apliko de progresaj labormetodoj mallongigis la instaltempon de la pordo por elflue je tri kvaronoj kaj ŝparis la laborforton je 55%.

Nuntempe en Ĉinio la agrikultura produktado estas ankoraŭ ĉefe produktado de individuaj kamparanoj, tial disvolvi malgrandajn irigaciajn konstruojn konformajn al la lokaj cirkonstancoj estas nun la ĉefa laboro en la irigacia konstruado. Sub la instigo, gvido kaj financa kaj teknika helpo de la partio kaj registaro, grandskala kampanjo de irigacia konstruado jam disvolviĝas tra la kamparo de la tuta lando. En multaj lokoj partiaj kaj registaraj gvidantoj la kampanjon partoprenas kaj gvidas persone irinte al la kamparo, kio naskis grandan influon de akcelo kaj stimulo. Ekzemple en la norda parto de Ĉinio miliono da putoj estis fositaj dum la pasintaj tri jaroj (fosi malprofundan puton por eltiri subteran akvon por irigacio per ĉerpilo turnata de bruto estas unu el la plej popularaj irigaciaj metodoj aplikataj de la nordaj kamparanoj). Entute estis 390,000 akvoĉerpiloj fabrikataj per ŝtata investo kaj disdonitaj al la kamparanoj kun produktokosto amortize pagata. La irigaciaj agroj plimultiĝis je proksimume 600,000 hektaroj.

Pli ol 3 milionoj da gravaj irigaciaj instalaĵoj, kiuj difektiĝis pro longtempa militado kaj plagoj, estas plene riparitaj, kio garantias al areo de pli ol 15 milionoj da hektaroj sufiĉan irigacian akvon. En Orienta Ĉinio, kiu enhavas 150 milionojn da loĝantoj, por la riparado de la ekzistantaj irigaciaj instalaĵoj la terlaboraĵoj jam superis 420 milionojn da kubaj metroj. Hunan-provinco, kiu estas nomata "unu el la ĉinaj rizkonservejoj", havas 1,100,000 hektarojn da rizkampoj, kiuj okupas 80% de la tutprovinca agraro. Irigacio estas necesega kondiĉo por la kresko de rizo. Pro la malzorgo pri la irigaciaj konstruoj antaŭ la liberiĝo, en la jaro 1949, kiam la provinco liberiĝis, la agrikultura produktokvanto malaltiĝis ĝis 76% de la meznombra jara produktokvanto dum la periodo de 1931-1936 antaŭ la Kontraŭjapana Milito. Kaj post la liberiĝo, dum tri jaroj estis riparitaj pli ol 600,000 irigaciaj instalaĵoj. En 1952, la agrikultura produktokvanto de la provinco

jam leviĝis ĝis 136% de la meznombra jara produktokvanto antaŭ la Kontraŭjapana Milito.

En la malnova Ĉinio, la irigaciaj instalaĵoj grandparte estis monopolataj kaj utiligataj de la bienuloj por subpremi kaj ekspluati la kamparanojn. Pro konflikto de interesoj inter si la bienuloj ofte instigis la kamparanojn al intermalpaciĝo pro uzo de irigacia akvo, kio kelkfoje fariĝis armita interbatalo. Tio iĝis la najbarajn kamparanojn eternaj malamikoj unuj al la aliaj.

Nun, la feŭda posedraĵo de irigaciaj instalaĵoj estas eliminata kaj fondiĝis demokrata administra sistemo de irigacio. La kamparanoj de sama irigacia regiono forigis siajn antaŭjuĝojn kaj intime unuiĝis; ili elektis reprezentantojn por starigi demokratajn administrajn organizojn kaj racie distribuas la kvanton de irigacia akvo laŭ la bezono de la plantaĵoj kaj aliaj kondiĉoj. En 1952 multaj kamparanoj disvolvis akvoŝparan kampanjon kaj aplikis sciencan irigacian metodon. Tiamaniere la irigacia efiko ĝenerale plialtiĝis. La laŭvice irigaciata areo de la flukvanto de unu sekundo-kubmetro de multaj irigaciaj kanaloj plivastiĝis de 800 hektaroj ĝis 2,000-2,600 hektaroj. La malracia fenomeno ke iuj kampoj tro multe da akvo uzis dum al aliaj akvo ne sufiĉis, nun fundamente malaperis.

Krom grandskala konstruado de irigaciaj instalaĵoj, la partio kaj Popola Registaro gvidis la kamparanojn al multfoja amasa malebligo kaj batalo kontraŭ trosekeco. La rimedoj kontraŭ trosekeco inkluzivas la diskonigon de scienca terkulturado por laŭebla konservo de akvo en la grundo, amasigon de glacio kaj neĝo sur la kampoj, eltrovon de ĉia utiligebla akvofonto, aplikon de punkta akvumo (akvumi punkte nur ĉe ĉiu plantaĵo) k.a. Per tiuj ĉi rimedoj oni batalas kontraŭ la minaco de trosekeco.

Kompreneble, kun la daŭra kresko de la konstruaĵoj akvokonservaj kaj irigaciaj kaj la plivastiĝo de la irigaciata areo, la minaco de trosekeco estos pli kaj pli malgrandigita, ĝis gravaj katastrofoj ne plu povos okazi eĉ se mankos la pluvo.

Por la Venko de Mondpaco . . .

(daŭrigo de p. 246)

surbaze de egaleco por akceli la reciprokajn komprenon kaj estimon inter la nacioj, sed samtempe ni forte kontraŭstaras la tiel nomatan "kosmopolitismojn," kiu estas fakte kultura agreso por sklavigi la mondon per Usona vivmaniero. Ni insistas pri solvo de ĉiaj internaciaj disputoj per paca intertraktado sed ni nepre devas kontraŭstari la intrigon de la militinstigantoj kiuj, sub la preteksto de intertraktado, elmetas antaŭkondiĉojn por intertraktado por realigi sian veran celon—saboti la intertraktadon. Tio estas grava punkto por la hodiaŭa batalo por defendo de longdaŭra mondopaco kaj por disvolvo de bona kultura tradicio de la homaro.

Ĉju Ĵuan, Copernicus, Rabelais kaj José Martí jam brile plenumis siajn devojn en siaj respektivaj epokoj. Ili estas senmortaj. Sekvi la piedsignojn de tiuj grandaj kulturaj antaŭirintoj kaj batali por la realigo de mondopaco kaj pliprosperigo de popola kulturo—ĉiuj ĉi respondecoj falas sur niajn ŝultrojn. Ni batalu kun la sama spirito de sinofero, vero-aspiro kaj servo al la popolo, por realigi la popolan amikecon, liberan vivon kaj longdaŭran pacon de la homaro.

La Ŝoseo-konstruado de Nova Ĉinio

Han Tŭo-fu

Plivastiĝas nun la reto de ĉinaj ŝoseoj, kiuj sin plektas inter la disvolviĝantaj fervojoj, akvo-vojoj kaj aerveturaj linioj kaj formas kune kun ili modernan komunikan sistemon kiu kompakte unuigas la vastegan teron de Ĉinio.

Nun la longeco de funkciaj ŝoseoj jam superis 120.000 km., t.e. kvinoble tiom kiom en la antaŭvespero de la liberigo. Ili inkluzivas lokajn ŝoseojn kaj longdistancajn ĉefliniojn. La ŝoseo inter Lanĉoŭ kaj Tihua, riparita post la liberigo, trapasas la faman Kansu-koridoron kaj Gobi-dezerton kaj ludas gravan rolon en komunikado de la Nordokcidento. La ŝoseo nove konstruata kun rapida progreso de Sikang al Tibeto trapasas profundajn valojn kaj torentajn riverojn, rampas sur la "spinon de la mondo" alportante novan esperon de feliĉa vivo por la tibetanoj.

Sur la ŝoseoj, ĉiutage kuras pasaĝeraj aŭtobusoj kaj ankaŭ granda nombro da ŝarĝaŭtoj. Per ĉi tiuj lastaj estas transportataj novtipaj agrikulturaj instrumentoj, sterko, semoj, ŝtofo, varmizolaj boteloj kaj bicikloj en la prosperiĝantaj vilaĝojn, kaj salo, teo, tabako kaj aliaj ĉiutagaj bezonaĵoj en la limregionojn al la naci-minoritatoj kiuj ilin precipe bezonas, kaj samtempe estas grandkvante transportataj grenoj, industriaj materialoj kaj diversaj lokaj produktaĵoj de la laboremaj kamparanoj al la urboj por provizi la tieajn loĝantojn kaj subteni la industriajn konstruadojn de la lando.

Malnovaj Ŝoseoj por Rabado

La konstruado de ĉinaj modernaj ŝoseoj komenciĝis en la tria jardeko de tiu ĉi jarcento. Por ekspluati la

laborantajn popolanojn kaj por ke la imperiismaj influoj profunde penetru en la internon de Ĉinio, la reakciaj regantoj konstruis, dum 10 jaroj, ĉirkaŭ 30,000 km. da ŝoseo.

En 1927, perfidinte la revolucion, Ĉiang Kaj-ŝek faris civilan militon, kaj multe konstruis ŝoseojn en Kuangtung, Kiangsi, Fukien k.a. provincoj por la milita bezono. Ĝis 1935, la tuta longo de la ŝoseoj kreskis pli ol kvinoble. Terpecoj de kamparanoj estis konfiskitaj kaj kamparanoj estis perforte kolektitaj por la konstruado de la ŝoseoj. Post la konstruiĝo venis reakciaj trupoj, kiuj faris ĉion malbonan al la popolo, kio vekis, ĉe la popolo loĝanta najbare de la ŝoseoj, fortan malŝanton al la ŝoseoj.

Tre malbona estis la kvalito de tiuj ŝoseoj, ĉar dum la konstruado, la burokrataĉoj alt- kaj malalt-rangaj alproprigis al si parton de la mono asignita por la konstruado. La plejparto de la ŝoseoj estis sen pavimo kaj nur malmultaj el ili estis malbone pavimitaj per sablo kaj gruzoj. Kiam pluvis, ili fariĝis tiel ŝlimaj, ke veturado neebligis. Sovagaĵ herboj dense kreskis sur multaj el la ŝoseoj. En 1948, restis efektive nur 75,000 km. da ŝoseo uzebla por veturado.


Je antaŭvespero de la liberigo, la Ĉiang-Kaj-ŝek-a banditaro furioze detruis la ŝoseojn panike forkurante sub pelado de Liberiga Armeo. Ili disfosis la vojsurfakon kaj eksplode detruis ĉiun ponton kaj tunelon, kiun ili havis tempon por detruiri. Rezulte de tio ĉirkaŭ 50,000 km. da ŝoseo fariĝis neuzeblaj. En 1949, la ĉina popolo estis ankoraŭ ekstermanta la restajn Kuomintang-banditojn, tamen samtempe ĝi jam komencis ripari la ŝoseojn, kaj ĉe la jarfino, 75,000 km. da ŝoseo jam estis en funkcio.

Konstruado post la Liberigo

Post la liberigo, grand-skala estis la ŝoseo-konstruado en Ĉinio. Tion klare montras jenaj statistikaj ciferoj: 102,800 km. da ŝoseo funkciis en 1950, pli ol 107,400 km. en 1951, kaj pli ol 120,000 km. je la fino de 1952. En tiu ĉi jaro la ŝoseo-konstruado despli grandiĝas. Nur tiuj linioj konstruataj per la rekta investo de la Centra Popola Registaro jam longas pli ol 5,000 km.

La volumeno de transportado kreskas senĉese. La ŝtata per-aŭta transportado

Ŝarĝaŭtoj preterpasas Ĵungjijah, Sinkiang-provinco





Ni elektu niajn delegitojn por la konstruado de nia patrolando!
de Taŭ Moŭ-ĝji

La Tutlanda Sportkunveno de Ĉinio en 1953


La unua tutlanda sportkunveno de nova Ĉinio okazis ekde la 2-a ĝis la 7-a, oktobro, en la Popola Stadiumo de Pekino. Ne malpli ol 19 rekordoj starigitaj en Kuomintang-aj tagoj rompiĝis. La 658 atletoj — 40 procentoj de ili estis virinoj — partoprenis la dromajn, kampajn, gimnastikajn kaj biciklajn konkursojn.



Jaŭteg, mongola atleto el la Popola beriga Armeo, kreis novan landan sordon de 15 minutoj 48 sekundoj por la 5,000-metra vetkuro.




Lŭo Jun-ĉi (PLA-ano) kreis novan landan rekordon de 12.19 metroj por la puŝ-ĵeto.



Jang Ĉia


Joŝ Ju-ing, el Nordorienta Ĉinio, gajnis la plej altan individuan poentnombron por rom- kaj kamp-konkursoj por virinoj.




Ma Jŭe-han, Ĉefo de la Juĝantaro, donas memorarojn al la vizitanta grupo de transmaraj ĉinaj sportistoj el Birmo.



La ferma ceremonio de la kunveno.





La malferma parado de la kunveno.




Ho Lung, Prezidanto de la Korpokultura kaj Sporta Komitato, malfermis la kunvenon.



La Norda Ĉinio, en sia venka salto sur la paraleloj.



La fino de la 80-metra hurdo-transkuro por virinoj.



La Junnan-a Instituto por Naciaj Minoritatoj

La Instituto por Naciaj Minoritatoj en la bela urbo Kunming, Junnan-provinco, estas trejnanta studentojn el 51 nacioj de la granda frata familio de Ĉinio.



Ĉe la enirejo de la Instituto.



Kantado post lecion-horo.



Grupo de amikoj el la nacioj Ji, Mjaŭ, Ani kaj Jaŭ studas sur herbejo en la Instituto.

de 1951 plimultiĝis je 75.5% ol tiu de 1950. Kaj tiu de la unua duono de 1952 plimultiĝis je 26.8% ol tiu de la sama periodo de 1951. Ankaŭ la privata aŭto-transportado disvolviĝis konsiderinde.

La ŝoseoj riparitaj kaj konstruitaj celas plenumi la bezonojn de la ekonomia konstruado.

En la Nordokcidento, la tuta reto de pli ol 17,000 km. da ŝoseo kun Lanĉoŭ kiel ĝia centro, etendiĝas en la provincojn Sinkiang, Cinghaj. Ningsia kaj Ŝensi, kunligante la riĉan agrikulturan regionon, senlime vastan naturan herbejon, kaj la regionon riĉan je mineraloj kun la novaj industriaj regionoj de la Nordokcidento.

En la Sudokcidento multe da ŝoseoj estas konstruitaj por faciligi la grandskalan ekspluatadon de la abunda riĉaĵo de mineraloj. En Seĉuan-provinco komenciĝis en marto de 1951 la konstruado de nova ŝoseo 526 kilometrojn longa, kiu iras de Ĉengtu al Aba de la Aŭtonoma Regiono de la Tibetanoj en nordokcidenta Seĉuan-provinco. La ĉefa celo de la konstruado de tiu ĉi vojo estas ekspluati la karbon, kupron, antimonon, k.a. gravajn mineralojn en tiu regiono. En 1952 aliaj ŝoseoj estis konstruitaj tra la montregionoj de Junnan kaj Tibeto, kaj duoble tiom da novaj ŝoseoj konstruiĝos ĉijare.

Helpo al Naciaj Minoritatoj

En lokado de novaj ŝoseoj en popola Ĉinio aparta atento estas donata al la disvolvo de la limregionoj kaj la regionoj de la naciminoritatoj. Inter 1949-1952, pli ol 11,000 km. da novaj ŝoseoj finkonstruiĝis en tiaj regionoj. Kaj plejparto de la linioj ĉijare konstruataj ankaŭ troviĝas en tiuj ĉi regionoj.

En la pasinteco, komunikado en la limregionoj kaj naciminoritataj regionoj estis tre malfacila. La lokaj produktadoj ne povis esti transportataj en aliajn regionojn, kaj aliflanke la varoj bezonataj en tiuj regionoj ankaŭ ne povis esti tien enportataj. Tio estis unu el la ĉefaj kaŭzoj de la mizera vivo de tieaj popoloj. Iuj minoritataj nacioj eĉ dum la tuta vivo uzis nenian fabrikajn.

Tia situacio rapide ŝanĝiĝis sekve de la liberiĝo de la tuta lando. Post la finkonstruo de la pli ol 400 km. longa Lanĉoŭ-Langmusi-a Ŝoseo, la varoj venantaj okcidenten per la Lung-Haj-a Fervojo senĉese fluas tra tiu ĉi vojo al suda Kansu kaj la limregiono de la provinco Kansu kaj Seĉuan, kie loĝas tibetanoj. Tie ĉi la tibetanoj povas nun havigi al si famajn teo-brikojn de Hunan, ŝtofojn de Tienzin, farunon de Lanĉoŭ kaj multajn aliajn objektojn eĉ la lokaj komercaj kompanioj. Samtempe la feloj, lano kaj aliaj varoj, kiujn la tibetanoj produktas, nun estas transportataj tra tiu vojo en la urbojn Pekino, Tienzin k.a. por disvendo.

En Sikang-provinco, kie la plejparto de la loĝantaro estas tibetanoj, la ŝoseoj preskaŭ tute detruigis antaŭvespere de la liberiĝo. Sed nun en tiu provinco la rekonstruitaj kaj nove konstruitaj ŝoseoj jam longas



Minoritataj nacioj en Dabejmjaŭzi, Aŭtonoma Regiono de Interna Mongolio, ĝoje bonvenigas la unuan aŭtobuson el la 750 kilometrojn fora Kalgano, Hopej-provinco.

entute pli ol mil kilometrojn. Laŭ nekompleta statistiko la tuta valoro de la lokaj produktadoj transportitaj tra la ŝoseoj el la Aŭtonoma Regiono de Tibetanoj en Sikang-provinco, dum la periodo de 1951 ĝis 1952, atingis 27 miliardojn da juanoj, samtempe en la regionon transportiĝis kvantegoj da varoj bezonataj de la lokanoj.

Sur la nova ŝoseo de Tihua al Kurla, seninterrompe fluas en Tihua'n la grenoj, kotono, lano k.a. abunde produktitaj de suda Sinkiang, kaj aliflanke la lokaj produktadoj, industriaj varoj kaj agrikulturaj maŝinoj de norda Sinkiang ankaŭ estas grandnombre transportataj al diversaj lokoj en suda Sinkiang.

La ŝoseo pli ol 900 km. longa de Ĝangbej ĝis Tungljaŭ kompletigita en 1952 ludas gravan rolon en interŝanĝo de varoj en la Aŭtonoma Regiono de Interna Mongolio.

Vojoj de Prospero

Ĉar la ŝoseoj estas tre utilaj por la popolo, precipe por la naciminoritatoj, ili fervore partoprenas en la ŝoseo-konstruado. La ŝoseoj vigligas interŝanĝon de varoj kaj akcelas disvolviĝon de produktado, kaj la salajroj, kiujn la ŝoseo-konstruantoj ricevis, rekte plibonigas ilian vivon, kaj vigligas la merkaton eĉ la ŝoseoj. Tiuj loĝantoj eĉ la ŝoseo-linioj, kiuj ne rekte partoprenis en la konstruado, provizas la laborantojn per loĝejoj. Tio ne nur faciligas la konstruan laboron, sed donas al la loĝejoj-provizantoj kroman enspezon.

Laŭ longe de la funkciigitaj ŝoseoj, la popolanoj organizis vojkonservajn taĉmentojn kaj ofte patrolas sur la ŝoseoj kun ŝoveliloj. Ili plenigas per tero ĉiujn kavojn kiujn ili trovis. Ili zorgeme protektas la ŝoseojn kiel sian propran plantaĵon.

La ŝoseo-konstruado de nova Ĉinio certe pli vaste disvolviĝos dank' al la subteno de la popolo. En regionoj, kie la ĉefaj komunikiloj estas ankoraŭ ŝarĝ-ĉevaloj, kareoj kaj eĉ portseĝoj, longaj aŭto-karavanoj ankaŭ estos videblaj en la proksima estonteco.

Kion Mi Vidis en Fuŝun

Vojaĝaj Notoj de Ljoŭ Bin-ĵan

Al tiuj, kiuj neniam antaŭe vizitis Fuŝun, la epiteto "karbo-urbo" nepre kaŭzas ian strangan imagon: urbo kun karbo-tavolo sub la tero, kun karbo-polvo sur la tero, kaj kun karbo-fumo en la aero; kaj la ministoj—homoj tutkorpe nigraj escepte de blankaj dentoj.

Ne, tute ne. Venu al Fuŝun kaj mem rigardu, kaj vi certe surpriziĝus vidante ke la verda urbo kaj ĝiaj loĝantoj estas tiel junaj kaj amindaj!

Verdaj montoj ĉirkaŭas la urbon Fuŝun, tra kiu silente fluas la rivero Hun. La tuta urbo estas verde ombrigata de malgrandaj ulmoj, junaj sterkulioj, maljunaj pinoj kaj cipresoj, kaj facila vento ĉie susuras inter la foliaro de poploj. Inter la vasta maro de verda foliaro troviĝas tie kaj ĉi tie ruĝetaj etaĝdomoj kun brilantaj ĉiel-blauaj fenestroj. La loĝantoj en tiu ĉi verda urbo amas belecon kaj florojn. Iu kvartalo de la urbo estas eĉ nomata "Rigardi Florojn". Post la liberiĝo la laboristoj plantis diversspecajn florojn antaŭ siaj fenestroj aŭ apud siaj muroj. En la minejo, sur ĉiu libera spaco aŭ eĉ apud la fumtubo, kreskas diversspecaj floroj. Kaj sur la strato vi ofte vidas ŝarĝaŭtojn, bele ornamitajn per ruĝaj sovaĝaj rozoj, fiere kurantaj preter vi.

Estas nature ke la loĝantoj de Fuŝun amas belecon. Ĉu troviĝas homoj kiuj ja pli multe scias kaj amas belecon ol la laboristoj! Fuŝun estas urbo de laboristoj. Inter la 300,000 loĝantoj pli ol cent mil estas laboristoj. Enkalkulante iliajn familianojn vi povas imagi, ke ĝi simple estas urbo de laboristoj. Matene sur la strato, krom la maljunaj floro-vendistoj kaj ĝardenistoj, vi trovas tre malmulte da vagantaj promenantoj. Tiam komenciĝas nova labora tago de la loĝantoj. Matene, kiam vi vidas konstruantajn laboristojn almetantaj la lastajn brikojn al la finotaj arbaro-

similaj domoj, aŭ vespere, kiam vi vidas la nokto-deĵorantajn ministojn fosantaj la karbo-tavolon en la libertiela minejo sub la brilo de elektraj lampoj, vi nepre admiras ilian grandiozan laboron—tio estas ĝuste la plej granda beleco de Fuŝun.

Sed Fuŝun ankaŭ havis siajn mallumajn tagojn—la tagojn dum la regado de la japanaj invadantoj kaj la Ĉiang-Kaj-ŝek-a regado. La reakciaj regintoj traktis la ministojn pli senkore ol la mineralon mem. Kie ajn aperis gaso aŭ subtera akvo, ili ŝtopis la koridorojn, sufokante centojn da ministoj en ĝi. Morto kaj kriplo embuskis la ministojn el ĉiu angulo de la minejo. Kiam matene la ministoj malsupreniĝis en la ŝakton, ili ne sciis ĉu ili povos supreniĝi vivantaj vespere. Neniu pensis pri morgaŭo, sed tiam, kiam ili ekprenis la manĝelpveton, ili ja ekmalĝoĝiĝis pro la morgaŭa manĝaĵo. En Fuŝun vi facile renkontus 25-26-jarajn laboristojn, kiuj povas rakonti al vi historion pri sia pli ol dekjara mizera laborista vivo, pri sia longtempa malriĉeco kaj sia insultata, premata kaj ekspluatata juneo...

La Ĉina Komunista Partio radikale ŝanĝis la sorton de la laboristoj. Post la liberiĝo, ĉiu koridoro kie povus okazi gaso-eksplozo, estis ĝustatempe ŝtopita kaj akvo-bariloj estis ĉie konstruitaj sub la ŝakto. En ĉiu flanko de la laborista vivo oni sentas la detalan prizorgon de la Ĉina Komunista Partio. La salajro de ministoj meznombre plialtiĝis 101 procentojn kompare kun tiu antaŭ tri jaroj, sed tiu ĉi cifero ankoraŭ ne sufiĉe klarigas la situacion. Ni prenu manĝon kiel ekzemplon. La ministoj povas akiri en la manĝejo manĝaĵojn, 35 procentojn pli malkarajn ol la merkato-prezo. La Fuŝuna Mineja Administracio projektis por la ministoj menuon de riĉa nutraĵo. Sescent okdek unu kuiristoj konkuris prepari pli bonajn manĝaĵojn por la ministoj. En la minejo nun aperis novaj profesioj kiel trejniĝantaj san-zorgistoj, melkistoj, administrantoj de dormejoj, banejoj, sanatorio k.t.p. Ili ĉiuj laboras por la sano kaj feliĉo de la ministoj.

En iu ordinara minejo de Fuŝun, la Minejo Drako kaj Fenikso, mi ĝoj surpriziĝis pro la granda ŝanĝo de la minista vivo. En la puraj dormoĉambroj, sur la litoj kuŝas novaj silkaj litkovriloj kaj puraj kaj blankaj kapkusenoj. Sur la fenestrosojlo, senescepte, estas kelkaj potoj da floroj. Antaŭ pli ol kvar jaroj ili loĝis en kabanoj aŭ sub ponto-arkajoj. Kiam pluvigis, ili timis ke ilia pajlokuseno malsekiĝos. Kiam frosta vento blovis, la malvarmo penetris en ilian korpon ĝis la osto. Nun tiuj samaj ministoj fariĝis la mastroj de tiuj ĉi varmaj ĉambroj. Tiuj malsanuloj, kiuj neniam havis la feliĉon esti prizorgataj en hospitalo, nun ripozas komforte en la sanatorioj aŭ ripozhejmoj. El la fenestro de la Modela Dormejo oni povas vidi montdeklivon kun pinoj kaj cipresoj. Unu lotusa lageto jam estas konstruita kaj oni estas nun konstruantaj kelkajn pavilonojn. Iu kamarado, kiu laboras en la sindikato, diris al mi: "Tie ĉi ni konstruos ĝardenon. Tie laborista dormejo por tricent homoj baldaŭ kompletiĝos. Kaj tie ni estas konstruantaj grandan ripozejon. La infanvartejo kaj kindergarteno ankaŭ estas pligrandigataj.

Pri Fuŝun

Fuŝun, unu el la fame konataj "karbo-urboj" de Ĉinio, lokigas tridek kvin kilometrojn oriente de Ŝenĵang en la Nordoriento. Ĝi estas unu el la malmultaj libertielaĵoj karbominejoj en la mondo. La areo de la mino atingas pli ol 58,000,000 kvadratajn metrojn, kaj sub la tero kaŝiĝas tre riĉa karbo-tavolo.

En tiu ĉi karbominejo iom grandskala fosado de karbo jam komenciĝis antaŭ mil jaroj. Ekde la lastaj tagoj de Ĉing-dinastio ĝis la kapitulaco de Japanio en 1945, ĝi estis prirabata de la imperiista Rusio kaj la japanaj imperiistoj unu post la alia, kaj poste, ĝi estis grave detruita de Kuomintang-reakciuloj. En oktobro de la jaro 1948 ĝi revenis en la manojn de la popolo, kaj iom post iom ĝi rekomencis produktadon.

Nun en tiu ĉi urbo de pli ol 12,700 kvadrataj kilometroj kun tute nova aspekto, ĉie leviĝas altaj ondoj de entuziasmo por la industriigo de Ĉinio.


Ni ankaŭ konstruos domojn kun plankspaco de 35,000 kvadrataj metroj, el ili 80 procentoj estas por la bonstato de la laboristoj. La konstruopiano ja estas sesoble pli granda ol tiu de lasta jaro...."

Konstrui, pligrandigi, denove konstrui kaj denove pligrandigi...jen kiel status la vivo de Fuŝun. Ne nur la materia vivo estas tiel, sed ankaŭ la spirita multe pliboniĝas.

La laborista klubo, kiu kapablas enteni 1,200 personojn, prezentas filmojn al la laboristoj 5 ĝis 7 fojojn pomonate. En la liberĉiela dancejo okazas baloj dufoje ĉiumonate. El la 3,700 analfabetoj, 2,800 jam povis legi librojn kaj skribi pri sia ĝoja laborista vivo je la fino de la lasta jaro. Pli ol naŭdek procentoj el la junaj ministoj estas lernantaj...En la sportkunveno de la maŝinfabrika, okazigita je la antaŭvespero de la Nacia Tago, ĉeestis tri generacioj: maljunaj ekslaboristoj blankharaj, junaj kaj viglaj gelaboristoj kaj iliaj gefiloj. La sekretario de la Filio-komitato de la Novdemokrata Junula Ligo diris al mi ke en la jaro 1949 estis nur sesdek kelkaj sportistoj, el kiuj granda parto estis teknikistoj kaj oficistoj. Sed nun jam estas pli ol 700 laboristoj kiuj konstante partoprenas en diversaj sportoj. La ĉampiono de vira 400-metra kurado estas laboristo kaj membro de la Ligo, nomata Tung Ĉi-lu. La Magneta Labor-grupo, kies estro li estas, plenumis la tutjaran produktoplanon de 1952 jam je la 10-a de aŭgusto de tiu jaro, kaj superplenumis la tutjaran planon de pliprodukto kaj ŝparo, kiu egalas al 208 tunoj da greno. Progresemaj produktantoj kaj bonaj sportistoj troviĝas en ĉiu minejo aŭ fabriko en Fuŝun. La ordinara laboristoj jam havas la eblecon sin evoluigi ĉiufanke. Pli kaj pli multe da laboristoj jam povas verki, gloriante la laboristan vivon. Iu juna labormodelo dum unu jaro skribis pli ol cent verkaĵojn en versoj

kaj prozo. En la minejoj kaj laborejoj, ĉiam aŭdiĝas kantoj—kaj vi ne malofte rimarkas iujn nespertajn voĉojn. Antaŭe multaj ja ne havis la oportunon, nek la bonhumoron, sin amuzi per kantado!

Feliĉo estas akirita per laboro. La laboristoj de Fuŝun restarigis kaj nove konstruis minejojn kaj fabrikojn el la ruinoj, plibonigadas la maŝin-ekipaĵojn kaj labor-metodojn, kaj samtempe per siaj manoj konstruas sian indan hejmurbon—"la karbo-urbo" teksita el laboro, sunlumo kaj belaj floroj.



Kablovagono por suprenporti karbon kuras sur la 650-metra relvojo.

Kurantaj Aferoj

Ŝirmforstzono en la Nordokcidento Kreskas

Dum la pasintaj 12 monatoj, pluaj 10,000 hektaroj estis plantitaj per arbidoj en la projektita 1,500 km. longa ŝirmforstzono en Nordokcidenta Ĉinio. Tiu ĉi aldona plantita areo estas 16 procentojn pli vasta ol la tuta areo plantita de 1950 ĝis 1952.

Unu el la kialoj de la rapidiĝo estas tio, ke la nombro de forstigaj centroj kaj stacioj, kiuj servas al tiu ĉi projekto, estas duobligita en tiu ĉi jaro. Nun kelkaj partoj de la ŝirmforstzono jam sufiĉe elkreskis kaj komencis doni protekton al lokaj agroj. Ekz. en Tengkoŭ-regiono, laŭlonge de la Flava Rivero en Ningsia-provinco, la moviĝanta sablo jam estas haltigita por la unua fojo. En la nordo de Ĝjoŭĉjŭan-gubernio, Kansu-provinco, kie oni kreskigis forstzonon longan je 25 km. kaj larĝan je 100 m., la lokaj kamparanoj rikoltis abundan rikolton ĉijare.

La plantado de ŝirmforstzono komenciĝis nelonge post la liberigo. Ĝi sterniĝis paralele al la Granda Muro de Ĵulin-gubernio en norda Ŝensi-provinco ĝis

Ĝjoŭĉjŭan-gubernio en Kansu-provinco. Post kelkaj jaroj, kiam ĝi plenkreskos, ĝi protektos centmilojn da hektaroj da agro kontraŭ la sablo-ventegoj, kiuj longe daŭras ĝis sep monatoj ĉiujare. Parto de la forstzono iras laŭlonge de la supra valo de la Flava Rivero, kaj tiel ĝi ankaŭ servos firmigi la riverbordojn kaj konservi de erozio la grundon.

50,000 Ŝanhajaj Laboristoj Transloĝiĝis en Novajn Domojn

Laboristaj familioj en Ŝanhajo konsistantaj el ĉirkaŭ 50,000 membroj celebris la ĉijaran Nacian Tagon per transloĝiĝo en novajn hejmojn. Ili pasigis la kelkajn tagojn antaŭ la 1-a de oktobro transportante siajn havaĵojn kaj ĉirkaŭrigardante siajn novajn ĉirkaŭaĵojn.

Entute 17 apartaj laboristaj domaroj konstruiĝas ĉijare en Ŝanhajo. Ili estas kiel vilaĝetoj kun vendejoj, lernejoj kaj infangardenoj.

Inkluzive de tiuj kompletigitaj lastjare, la novaj laboristaj loĝdomaroj en Ŝanhajo nun kapablas enloĝigi 100,000 personojn.

Kurantaj Aferoj

Mej Lan-fang—

Granda Klasika

Aktoro de Ĉinio

U Zu-güang

Mej Lan-fang je la sesdek-jara aĝo, kaj post preskaŭ kvindek-jara vivo teatra, estas ĉe la zenito de sia populareco. Lia arto restas senrivala en la nuntempa klasika teatro de Ĉinio. Estas senprecedence en la historio de la ĉina teatro ke aktoro de tia aĝo ankoraŭ ludas la multe-postulan ino-rolon *dan* en Pekina Opero. En aprilo ĉijare, li vizitis Ŝanhajon kun sia trupo por dudek-taga prezentado. En la unua tago sola 60.000 homoj mendis sidlokojn. Tio estis nova biletvenda rekordo eĉ por li mem. Kaj pli ol 60 procentoj de lia Ŝanhaja aŭdantaro estis laboristoj. Estas en liberigita Ĉinio ke Mej Lan-fang trovis, por la unua fojo, sian aŭdantaron inter la grandaj popolamasoj de la laboranta popolo.

Mej Lan-fang devenas de eminenta familio de aktoroj. Lia avo, Mej Ĉjaŭ-ling (1842-1881), lia patro, Mej Ĝu-fen (1874-1896), li mem kaj lia filo, Mej Baŭ-ĝjoŭ—ĉiuj atingis eminentecon en ludado de ino-roloj en la Pekina Opero. Mej Lan-fang, tamen, speciale eminentiĝis per la novaj disvolvoj de li faritaj en prezentado de la ino-roloj kaj verdire, en la tuta Pekina Opero.

Gravaj Renovigoj

En la Pekina Opero estas kvar ĉefaj tipoj de roloj: *ŝeng* (viro), *dan* (ino), *ĝing* (generaloj k.a. kun pentrita vizaĝo) kaj *ĉoŭ* (arlekeno). Kaj krome estas ankoraŭ variaĵoj de tiuj ĉi fundamentaj tipoj. Mej Lan-fang estas unu el la malmultaj aktoroj kiuj lerte ludas ĉiujn variajn tipojn de *dan*: *ĉingji* (la bona, honesta tipo), *hŭadan* (la koketa, facilanima tipo) kaj *daŭmadan* (la tipo de ina militisto).

Laŭ la malnova tradicio de la Pekina Opero, la ludanto de *ĉingji*-roloj mastras ĉefe kantadon, *hŭadan* gestesprimadon kaj *daŭmadan* scenejan bataladon. Ordinare unu aktoro mastras speciale nur unu tipon. Estis la avo de Mej Lan-fang, Mej Ĉjaŭ-ling, kiu la unua defiis tiun ĉi konvencion. Estis Ŝang Jaŭ-ĉing, kiu estas nun 72-jara kaj la estro de la Eksperimenta Lernejo por la Pekina Opero, kaj poste Mej Lan-fang kiuj establis la novan principon ke la *dan*-aktoroj devas kunfandi kantadon, gestesprimadon kaj dancadon de ĉiuj tri tipoj de ino-rola. Tiel Mej Lan-fang metis la *dan*-rolon sur egalan pozicion kun tiu de *ŝeng*, kiu estis la tradicia ĉefrolo en la Pekina Opero. Li montris al ĉiuj nunaj *dan*-aktoroj aŭ -aktorinoj la ĝustan vojon kiun ili klopodas sekvi.

Al li ŝuldas ankaŭ la disvolvo de la ĉina historia dramo en la nuntempa klasika teatro. Li enkondukis novajn teatraĵojn surbaze de incidentoj kaj gravuloj el aktuala historio kaj el klasika literaturo. Li starigis novan altan normon en kostumo, kaj aldonis multajn renovigojn al dancarto kaj gestesprimado.

Estas ekstreme malfacile priskribi per vortoj la efekton produktitan de Mej Lan-fang ĉe la zenito de sia arto sur la scenejo. Ĉi estas prezento de senerara gusto kaj gracieco, belo kaj brileco de koloro kaj moviĝo, subtileco, klareco kaj profundeco de esprimado, perfekta akordo de voĉo kaj gesto....

Granda natura talento kaj artisteco kulturitaj en kvindek jaroj de penaj laboro kaj studado, lia intima interligo kun la vastaj amasoj de la laboranta popolo post la liberiĝo kaj la granda famo kunligita kun lia nomo estas la kaŭzoj kial lia aŭdantaro ĉiam venas al lia prezentado kun avido kaj respekto. Kaj Mej Lan-fang ĉiam donas al ili nur sian plej bonan artaĵon.

Tri Elstaraj Roloj

Mej Lan-fang estis ektrejnata en sceneja arto je la okjara aĝo. Kiel ĉiuj profesiaj aktoroj de la Pekina Opero kiuj aspiras atingi la zeniton de sia arto, li mas-tris pli ol cent rolojn. Hodiaŭ, li havas multe malpli ampleksan kaj atente selektitan repertuaron. *La Ebria Belulino*—la historio pri la fama belulino Jang Ĝuej-fej, kiu, neglektite de la imperiestro, drinkis por moderigi sian ĉagrenon, estas akklamita de ĝenerala opinio kaj favorata de li mem kiel unu el liaj plej bonaj kreaĵoj.

La Ebria Belulino manifestas la malplenecon kaj neŭrozan korprematecon en la vivo de feŭda konkubino.

La melankolio de forlasita virino estas prezentita tra la longe tirata kaj maldolĉa melodio *Sipingdjaŭ* (unu el la tradiciaj melodioj de la Pekina Opero) kaj la gestesprimado kaj dancado de la aktoro. La teatraĵo estas penetra studo de karaktero; ĝi estas subtile satira kaj tamen plena de homa varmo. Mej Lan-fang mem priskribas ĝian disvolvon kiel jene:

Jang Ĝuej-fej drinkis la unuan pokalon kiam ŝi informiĝis pri tio ke la imperiestro iris al sia nova favoratino en la Okcidenta Palaco. Ŝi sentis forlasitecon kaj ĉagrenon. Ŝi drinkis por forpasigi tempon kaj moderigi sian malĝojon, klopodante ŝajnigi indiferecon kaj drinki en sia digna maniero.

Atakita de la unua pokalo, ĵaluzon ŝi eksentis pensante pri sia rivalino. La duan pokalon ŝi prenis kun kreskanta ĉagreno. De la tria pokalo ŝi tiel malsobriĝis ke ŝi drinkadis ĝis profunda ebriiĝo. Per ĉarmaj kantado kaj dancmovoj Mej Lan-fang klare kaj delikate prezentas la iom-post-ioman ebriiĝon de la belulino de la komenco ĝis la fino. La lerteco de Mej Lan-fang estas plej bone rimarkebla per komparado de lia prezentado kun tiu de aliaj malpli talentaj aktoroj, kiuj englitas en krudecon dum la prezentado de la progresanta ebriiĝo de la belulino, kaj sekve ne povas vek-

en ni simpaton por tiu ĉi malfeliĉa virino kaj la proteston kontraŭ la feŭda traktado al virinoj kiujn la prezentado de Mej Lan-fang tiel subtile esprimis.

Dum pli ol kvardek jaroj Mej Lan-fang pristudadis kaj prilaboradis la operon *Ĉasteco kontraŭ Tiraneco*, kiu estas unu el liaj plej ŝatataj operoj. La dramo rakontas pri antikva ĉastulino kiu brave batalis kontraŭ la absurda ordono de sia avida patro edziniĝi al tirana imperiestro. Estante sub fortaj manoj kaj sen helpo, ŝi ekŝajnis freneziĝon por sin liberigi el la ungoj de tiraneco.

La realisma dramluda arto de Mej Lan-fang injektis novan vivon en la stereotipan prezentadon de tiu ĉi rolo kutime donita en la Pekina Opero. La viglaj kaj delikataj dancmovoj, kiujn li enkondukis en ĝin, vivigis tiun ĉi operon por ni hodiaŭ. Kaj plie, liaj kantado, dancado kaj gestesprimado nedisigeble interplektigis por elmontri la melankolian humoron de la virino.

La nuna produkto de *Ĉasteco kontraŭ Tiraneco* estas malrapide kaj pene disvolvita. Laŭ tradicio ĝi estis prezentita preskaŭ nur per kantado. Malmulte da movoj kaj gestesprimoj estis en ĝi. Mej Lan-fang plene prezentas la karakteron de tiu ĉi heroino per kanto, danco kaj dramluda gestesprimado. Nun ŝi aperas kiel virino sentima al forto kaj malceda al tento, modelo de virina saĝeco kaj forta volo.

Estas tiaj produktoj, kia tiu ĉi, kiuj pruvis kiel efika povas esti la apliko de danco en la Pekina Opero. Mej Lan-fang tamen ne ĉesas plibonigi tiun ĉi operon. Lia senlaca esplorado kaj perfektigado estas lerninda por ĉiu artisto.

Du aliaj favorataj pecoj nun ankoraŭ ofte ludataj de Mej Lan-fang estas la *Akvo-batalo* kaj la *Rompita Ponto*, du scenoj el la populara tragedio *La Historio de la Blanka Serpento*. Ĝi rakontas pri la Blanka Virino, metamorfoziĝinta el serpento, kiu enamiĝis kaj edziniĝis al la junulo Ŝju Ŝjan. Sed ŝia amato estis tenata for de ŝi de malbonfarema monako Fa Haj. Ŝi vane petegis lin ke li ĉesu intrigi kontraŭ ilia amo.

Ŝi bone sciis, ke ŝi ne havas egalan forton kontraŭ li eĉ se ŝi batalos kontraŭ lia magia povo kune kun siaj akvaj spiritoj, sed pelate de sia amo ŝi ĉiel klopodis reakiri sian amatan edzon. En la furiozo de la batalo, akuŝo venis al ŝi, kaj ŝi malvenkis. Poste ŝi okaze renkontis sian malfidelan amaton sur ponto. En sia emocio, malestimo estis miksitita kun amo. Kvankam Ŝjaŭ Ĉing, ŝia servistino, deziris tuj mortigi lin, ŝi defendis kaj pardonis lin.

En tiu ĉi dramo el popola rakonto, la Blanka Virino simbolas la virinojn kiuj, por miloj da jaroj, suferadis sub la subpremado de feŭda jugo kaj tamen montris sian konstantecon en amo, sindonemon, fortan volon, kuraĝon kaj mildecon. La Blanka Virino ludita de Mej Lan-fang perfekte elmontris tiujn ĉi kvalitojn de la heroino, kaj tio ĉi siavice fortigis la kortuŝecon de la dramo.

Vojo al Sukcesoj

La Pekina Opero origininta en Pekino hodiaŭ ĝuas tutlandan ŝaton kaj popularecon. Ne malgrandan kon-



Mej Lan-fang sin aliigas

tribuon al tiu ĉi rezultato Mej Lan-fang faris per siaj multaj rond-iroj tra la lando. Mej Lan-fang ankaŭ ĝuas mondan renomon. Lia arto estis vaste akklamata dum la prezentadoj kiujn li faris en Japanio en 1924 kaj en Usono en 1930. Lia prezentado en Sovetio en 1935 estis akklamata kiel elstara teatra evento.

Kritikistoj universale donas grandan tributon de admiroj kaj laŭdoj al lia eminenta dramluda arto. En la plena floriĝo de lia genio, li ludas perfekte kaj senpene. Sed li mem rimarkis:

Mi ne estas brila artolernanto. Havante ne sufiĉan talenton, mi devis preni la vojon de diligenta lernado. La vojo, kiun mi trapasis kiel artostudento, estas la sama kiel tiu de aliaj. Ne troviĝis facila vojo; ne pli mallonga vojo. Mi neniam ŝatas flatajn vortojn. En la pasintaj dekoj da jaroj mi ĉiam min apogis sur miaj instruistoj kaj kolegoj por ke ili montru al mi miajn mankojn kaj helpu min korekti ilin kaj fari plibonigon ĝustatempe....

Li skribis pri la malfaciloj kiujn li spertis en sia infanaĝo kaj plipostaj jaroj. Li ŝatas citi la popularan diron: "Aferoj estas senescepte malfacilaj en la komenco; sed kiam vi jam gustis la maldolĉon de laboro, des pli dolĉaj estos la fruktoj finfine." Li skribis:

Kiam mi pensas pri la fakto, ke je sesdek-jara aĝo, mi ankoraŭ povas ludi rolojn en tiaj dramoj kiaj *La Ebria Belulino*, *La Fortikaĵo Muke*, *La*

*Hungni-pasejo**...kiuj postulas grandan fizikan forton kaj viglajn dancmovojn, mi ne povas ne senti dankemon al miaj instruistoj kiuj estis tiel rigoraj al mi dum la tempo de mia fundamenta dramluda trejnado.

Tio ĉi bone klarigas kiel neapartigeblaj estas la sukcesoj en arto de Mej Lan-fang disde liaj senĉesa lernado, akceptado de kritikoj kaj kuraĝo en memkritiko—virtoj kiuj estas esencaj al ĉiuj grandaj entreprenoj.

La atingajoj de Mej Lan-fang en arto estas neapartigeblaj de liaj personeco kaj karaktero. Ĉiuj kiuj kontaktiĝis kun li estas senescepte impresitaj de lia afableco kaj profunda modesteco. Liaj kolegoj neniam ĉesas laŭdi lin pro liaj bonkoreco, konstanteco en amikeco, malavareco, kaj severa observo de siaj promesoj. Tio ĉi estas mirinde montrita de la fakto, ke plejmulto de la membroj de lia trupo estis kun li por la pasintaj jardekoj. Li estas plej alproksimiĝebla, amika, kviet-temperamenta kaj ĉiam respektoplena al aliuloj.

Kiam mi vidis lin la unuan fojon, mi ne povis ne ekmemori la vortojn el *La Libro de Odoj*: “Milda kiel jado,” kaj aliajn vortojn el *La Libro de Ritoj*: “Tiuj kiuj havas bonan koron, havas dolĉan voĉon.” Li estas homo kiu kulturas scion kaj virton kun serena koro. Liaj konstanta spirito kaj juna vivforto estas atributoj de lia nobla karaktero.

Mej Lan-fang montris sian solidecon dum la okprovaĵaroj de la Rezistimilito kontraŭ Japana Invado. Enkaptita en la de japanoj okupata regiono, li sin detenis

**La Fortikaĵo Muke* rakontas la historion kiel Mu Ĝuej-jing, batalantino, kaptis, en batalo, junan komandanton Jang Zung-baŭ, enamigis kaj fine edziniĝis al li. En *La Hungni-pasejo* la komandanto de la pasejo estas mortigita, kaj lia vidvino eniris batalon por venĝi lian morton.

Mej Lan-fang (dekstre) ludas la rolon de *La Ebria Belulino*.



de la teatra scenejo per kreskigo de lipharoj. En malfacilaj ekonomiaj cirkonstancoj, li forvendis aŭ lombardis siajn personajn posedaĵojn por subteni sian familion kaj malnovajn amikojn. Li firme tenis sian patriotismon kaj amon al sia arto.

Nuntempaj Agadoj

Post la liberiĝo, Mej Lan-fang ricevis honorojn de la popolo, kiujn li vere meritas. Li estas la Direktoro de la Ĉina Opera Esplora Instituto en Pekino. Tie li gvidas la trejnadon de la juna generacio de aktoroj, donante al ili sian riĉan scion pri la klasika heredaĵo. Li ludas aktivan rolon en la kritika asimilado kaj disvolvado de tiu heredaĵo.

Li estas membro de la Konstanta Komitato de la Tutĉinia Federacio de Verkistoj kaj Artistoj, en kiu li ludas gvidan rolon en la diskutado pri la novnaskitaj demandoj pri arto kaj en la artisto agado en la nova socio, kaj precipe en zorgado pri la pozicio de aktoroj en iliaj arto kaj vivo.

Li estas membro de la Tutlanda Komitato de la Popola Politika Konsiliga Konferenco de Ĉinio, la plej alta organizo de ŝtata potenco en nova Ĉinio. Li estas konata kiel lojala pacbatalanto pro siaj kontribuoj al la Pakkonferenco de la Azia kaj Pacifika Regionoj okazigita en Pekino, 1952 kaj poste al la Popola Kongreso por Paco en Vieno.

Tiaj agadoj kaj honoroj estas la frukto de la principoj kiuj gvidadis lian vivon kaj inspiris lian solidan patriotismon. Li faris ne malgrandan servon al la popolo portante al la Liberigo la plej bonajn tradiciojn de la klasika teatro sendifektaj kaj riĉigitaj. Li ne nur disvolvis la teknikojn de la Pekina Opero sed ankaŭ donis al ĝiaj tradiciaj temoj modernan progresan komprenon. Estas ne hazardaĵo ke li revivigis dramojn de revolucia signifo sur la klasika teatro kiel *La Fiŝisto kaj Lia Filino* kaj *Hŭa Mu-lan*, la knabino-batalantino. Lia laboro super la teatro estas granda kontribuo donanta al la klasika teatro la

vivoforton, kiu hodiaŭ ĝin inspiras kaj ebligas al ĝi solvi multajn problemojn, kiuj frontas al la tradiciaj artoj en la rapide ŝanĝanta realo hodiaŭa, dum Ĉinio antaŭenmarŝas tra la nova demokratio al socialismo.

Kiam li finis lastatempan prezentadon por laboristoj ĉe Uŝji, Mej Lan-fang diris al ĵurnalistoj: “En la pasinteco, multaj demandis al mi kiam mi finos mian teatran vivon. Nun mi diras al ili: mi ĉesos aperi sur la scenejo nur kiam mi ne plu povos ludi.”

Tiel li esprimis sian decidon, karakterizan pri lia tuta kariero, servi al la popolo kun sia arto ĝis la limo de sia povo.

Ŝen Ĝji-lan—Virino de Nova Ĉinio

Ĝoŭ Min-ji

La unua fojo kiam mi vidis Ŝen Ĝji-lan estis ĉe la Dua Tutĉinia Virina Kongreso okazigita lastatempe en Pekino. Tiu ĉi fortika juna virino 24-jara, kun haroj pendantaj ĝis ŝiaj ŝultroj, estas vicprezidanto de la tutlande konata agrikultura produkta kooperativo gvidata de Li Ŝun-da. Ŝi memfide supreniris la podion kaj vivece rakontis, en provinca akcento de Ŝansi, kiel ŝi mobilizis virinojn por partopreni en agrikultura produktado kaj sukcesis gajni egalan pagon por egala laboro.

Du tagojn poste mi vizitis ŝin en gastejo kie estis loĝantaj kelkaj el la delegitoj. Tie, kiel en la kongreso, ŝi donis impreson de freŝa forteco kaj kompleta malesto de timemo. La rideto sur ŝia larĝa vizaĝo kiam ŝi saltleviĝis por saluti min estis varma kaj senkaŝa; ŝia manpremo firma kaj forta. Respondante demandojn rapide, ŝi ĉiam fiksadis siajn esprimoplenajn okulojn sur mian vizaĝon por certigi ke mi komprenis. Ŝiaj priskriboj estis klaraj kaj ĝisfundaj, kun ekbriloj de spritaĵoj.

Nia konversacio komenciĝis per la du medaloj kiujn Ŝen Ĝji-lan estis portanta. “Mi ricevis ĉi tiun,” ŝi diris, “kiam mi estis elektita modela kamparano de nia provinco. Kaj ĉi tiu estas la unuaklasa premio por modelaj armeaj familianoj. Mia edzo estas kun la volontuloj en Koreio. Ni ĵuris unu al la alia—li bone batalu por defendi nian bonan vivon kaj mi bone laboru por helpi konstrui nian landon. Mi organizis aliajn armeajn familianojn en la vilaĝo por partopreni en produktado kaj regule skribi leterojn al la fronto.”

La du ordenoj min kondukis al la vivhistorio de Ŝen Ĝji-lan. Ĝi estas historio kiu diras multe pri la virinoj de nova Ĉinio.

Laboro kaj Lernado

Ne kiel siaj prapatroj kiuj suferadis dum sia tuta vivo, Ŝen Ĝji-lan apenaŭ havis personan memoron pri subpremado. Ŝi devenis de pli frue liberigita regiono. Ŝi estis ĝuste naŭjara kiam la Okavoja Armeo liberigis ŝian vilaĝon de la japanoj en 1938. Post tio, ĉio konstante pliboniĝis. Al ŝia familio estis asignita tero. Ŝen Ĝji-lan memlernis manĝpinadon kiu pliigis ilian enspezon. Estante dekkvinjara, ŝi aliĝis al iu agrikultura interhelpa grupo en kiu ŝi poste fariĝis aktiva gvidanto. En la vintro de 1951 kiam la Agrikultura Produkta Kooperativo de Li Ŝun-da estis fondita, oni elektis ŝin ĝia vicprezidanto.

“Kian agrikulturan laboron vi povas fari?” mi demandis.

“Mi estas forta. Kian ajn laboron mi povas fari,” Ŝen Ĝji-lan ridis agrable.

“Ĉu vi ĉesis labori surkampe kiam vi fariĝis vicprezidanto?”

“Kiel mi povus? Kiu aŭskultus al vi se vi donus ordonojn sed ne laborus mem?”

“Kiel estas via ĝenerala edukado?”

“Mi iris al lernejo nur kelkajn tagojn kiam mi estis infano. Dum la militaj jaroj, lernado estis ankoraŭ malfacila. Sed lastatempe mi vizitas rapidmetodan kurson por ellerni ideografojn.”

“Nun mi scipovas legi ĉi tion,” diris Ŝen Ĝji-lan, ekprenante kopion de la presitaj ĉiutagaj protokoloj de la Virina Kongreso, kaj legante el ĝi. En ĉi tia presaĵo, kiel en la ĵurnaloj, pli ol du mil ideografoj estas uzataj.

Malnovaj Antaŭjuĝoj Restis

En la dua printempo post kiam la kooperativo estis organizita, Ŝen Ĝji-lan daŭrigis sian rakonton, ĝi decidis ne nur pligrandigi la produktokvanton, sed ankaŭ entrepreni forstigadon kaj brutobredadon. Por akiri la necesan laborpovon, la virinoj devis esti aktivigitaj. La tuta produkta plano dependis de tio.

“Ne estis facile,” diris Ŝen Ĝji-lan. “Nia Ŝjigoŭ-vilaĝo estis fama pro sia politika progresemo. Nia produktorekordo estis bona. Ni jam forigis malbontrakton al virinoj kaj devigan geedziĝon. Tamen tio ne signifis ke feŭdaj ideoj jam tute malaperis aŭ ke la plejparto de viroj rigardas virinojn kiel egalulojn. Tute ne. Se juna edzino volis fari por si veston, ŝi ankoraŭ devis ricevi la konsenton de siaj borgepatroj aŭ de sia edzo. Ĉe la tablo la viroj ankoraŭ prenis la plej bonan manĝaĵon dum la virinoj servis. Mia propra bopatrino diris al mi, ‘Ĝji-lan, ni ĉiuj vivas de la laboro de via bopatro. Li devas manĝi bone. Rilate al ni, taŭgas io ajn.’”

Tio estis la kaŭzo, Ŝen Ĝji-lan diris, kial ŝi trovis en la komenco ke involvi virinojn en agrikultura produktado estis tiel malfacile. La viroj deklaris, “Virinoj ne estas terkulturistoj.” La pli maljunaj virinoj diris, “Ni povas kuir, arangi litajojn kaj senŝeligi grenojn. Ni ne estas taŭgaj labori sur la kampoj.” Kelkaj junaj virinoj diris ke al ili mankas kapablo; krome ĉia ajn gratifiko pagota al virinoj estus ne sufiĉa por pruvi ke la klopodo estas inda.

Vojo Trovita

“Mi komencis labori paŝon post paŝo,” diris Ŝen Ĝji-lan. “Unue, mi vizitis ĉiujn virinojn kaj al ili klarigis ke nur laboro povas liberigi ilin. Tio altiris pli ol dek el ili. Poste mi provis persvadi la pliaĝajn. Mia plano estis persvadi S-inon Ĉin kiu ŝatis nek lerni legadon nek iri al kunvenoj. Ŝi estis konata kiel postĝinta kaj mallaborema. Ŝia edzo malestimis ŝin kaj la vilaĝanoj nomis ŝin ‘stultulino.’ Sed mi pensis, ‘Se S-ino Ĉin povas esti instigita al laboro, la aliaj pensos hontinde tion, ne fari.’”

Pacience Ŝen Ĝji-lan penis influi ĉi tiun virinon. Ŝi diris al ŝi, “Ni estos neniam emancipitaj se ni ne produktas.” Sed S-ino Ĉin nur respondis, “Mi estas tro maljuna. Mi ne zorgas ĉu ni estas emancipitaj aŭ ne.” Sekve Ŝen Ĝji-lan parolis pli pri persona afero. “Via edzo malestimas vin kaj vi havas neniun decan veston. Se vi elvenos, via familio gajnos pli da enspezo kaj via edzo vin estimos.”

La sekvintan tagon S-ino Ĉin iris al la kampoj. Ŝen Ĝji-lan instruis sin sarki kaj ŝi tuj laboris energie. En la vespero, ne zorgante pri sia vespermanĝo, Ŝen Ĝji-lan kuris al la novaĵ-anoncanto de la vilaĝo kaj persvadis lin disaŭdigi novaĵpecon laŭdantan la bonan laboron de S-ino Ĉin. Aŭdinte tion, la aliaj virinoj ankaŭ elvenis. En tri tagoj, ili sarkis 35 muojn da tero.

Batalo por Egaleco

“Nun estiĝis nova problemoj,” rakontis Ŝen Ĝji-lan. “La ĉiutaga pago por virinoj estis nur duone tiom kiom por viroj, kaj la virinoj estis ne kontentaj. Mi prezentis ĉi tiun problemon al la administra komitato, sed ĝiaj membroj estis ĉiuj viroj kaj la plejparto de ili diris, ‘Lasu la virinojn pruvi sian kapablon antaŭ ol ili petas por pli da pago.’ Mi estis senkuraĝigita, sed Sung Ĉin-ŝan, sekretario de la vilaĝa ĉelo de la Komunista Partio, diris al mi, ‘Ne ĉagreniĝu! Manifestu kelkajn produktajn atingajojn kaj neniu povos kontraŭstari egalan pagon plu. La Partio vin subtenas. Se vi renkontos malfacilaĵojn, venu al ni.’”

Pli poste Ŝen Ĝji-lan faris proponon, kiu estis akceptita de la Particelo, ke kelkaj virinoj iru al la guberniurbo por lerni agrikulturajn teknikojn. Ĝi kaj du aliaj junaj virinoj estis kune senditaj tien, kaj la administra komitato de la kooperativo komisiis du spertajn kamparanojn instrui la restantajn. Baldaŭ triono de la virinoj fariĝis bonaj ĉiopovaj terkulturistinoj.

Kiel la sekretario de la Partio antaŭdiris, la unua vera venko por egala pago kaj egala socia situacio estis gajnita rezulte de pliiĝita produkta kapablo. Pri ĉi tiu unua sukceso Ŝen Ĝji-lan diris, “Tun tagon unu el niaj virinoj, Ĝang Ŝjue-hŭa, iris erpi kun Ma Ju-ŝing, kiu estas viro. Laŭ la konjekto ke ŝi povas nur fari la pli facilan parton de la laboro, estis unue decidite ke Ĝang Ŝjue-hŭa ricevos kvar ‘poentojn’ ĉiutage dum Ma la plenan ‘dekon.’ Sed ekstere sur la kampo, ŝi defiis lin por interŝanĝi rolojn kaj plenumis sian parton la tutan posttagmezon, farante ĝin tre bone. Rezulte de tio, la

administra komitato decidis ke iliaj pagoj devas esti samaj. Kiam mi aŭdis tion, mi tuj disvastigis la novaĵon. La virinoj estis tre ĝojaj kaj laboris kun pli granda entuziasmo. Post ne longe, la kooperativo konfidis erpadon tute al la virinoj, liberigante la virojn por aliaj pli penigaj laboroj.”

Ellerno de Novaj Teknikoj

Tamen la batalo ne finiĝis ĉi tie. Multaj kooperativanoj diris, “Egala pago ne devas esti aplikata sendistinge.” Ekzemple, transplantado estis rigardata kiel tre altteknika laboro—kaj la viroj ne kredis ke la virinoj ellernis ĉi tiun teknikon de siaj instruistoj. Konkursito estis aranĝita, en kiu la virinoj pruvis ke ili ne nur ellernis ĝin, sed per siaj lertaj manoj ili povis transplanti pli rapide ol la viroj. De post tiam ankaŭ ĉi tiu laboro estis tute transdonita al la virinoj.

Inspirite, la virinoj manifestis sian kompetentecon en aliaj laboroj. Ili finis sian parton en sterkado pli frue ol la viroj kaj rivalis kun ili eĉ en profunda plugado. Kiam la kooperativo bredis ĉirkaŭ cent ŝafojn, Ŝen Ĝji-lan deĵoris dum certa tempo kiel paŝtisto, kaj paŝtis la tutan ŝafaron sukcese. Ĉia babilo pri virina sentaŭgeco por tio aŭ alio ĉesis.

Viroj, Virinoj Laboras Kune

La vizaĝo de Ŝen Ĝji-lan brilis kiam ŝi preparolis kiel virinoj estis efektive plene organizitaj en la kooperativo. “Laŭ mia propono,” ŝi diris, “la tuta kooperativo estis reorganizita en miksitajn grupojn de viroj kaj virinoj por la diversspecaj laboroj. Ni dividadas ĉiun procedon science ke ĉiu persono, nekoniderante sekson, plenumu la laboron plej taŭgan por lia aŭ ŝia kapablo kaj korpa forto. Kompreneble kelkaj specialaj aranĝoj devas esti faritaj por la bono kaj sano de la virinoj. Laŭ nia regularo, ili estas liberaj de surkampa laboro por kvin tagoj dum iliaj menstruaj periodoj—kaj por sufiĉe longa tempo antaŭ kaj post akuŝado. Nia kooperativo ankaŭ trejnigis akuŝistinojn,

Kurantaj Aferoj

La Unua 100-tuna Rulponta Argano Farita en Ĉinio

La unua 100-tuna elektra rulponta argano baldaŭ instaligos en la No. 101 Ŝtal-fabrikaĵo de Ĉungking, kiu estas la ĉefa reproduktejo de Ĉinio. La argano kiu pezas 140 tunojn havas kur-vojon de 19-metroj.

Laboristoj de la ŝtat-posedata Ŝanhaja Kaldronego-fabrikaĵo faris la arganon kiel kontribuojn al la unua Nacia Tago de Ĉinio en la unua kvinjara plano. Ĝi estas tute desegnita de ĉinaj inĝenieroj.

Pekina Zoologia Ĝardeno Estas Filmigata

Filmo pri la Pekina Zoologia Ĝardeno, la plej granda el ĝia speco en Ĉinio, estas farata de la Centra Kinematografika Buroo.

La filmo montros la ĉirkaŭ 200 rarajn bestojn, birdojn kaj fiŝojn kolektitajn el diversaj partoj de la lando kaj el fremdaj landoj. La distribuo de la filmo ebligos al milionoj da infanoj kaj plenaĝuloj vidi propraokule la rapide ekspansiĝantan zoologian ĝardenon de la ĉefurbo.

Nordorienta Ĉinio Reduktas Ŝtofo-prezojn

Prezoj de pli ol 1,200 specoj de koton-, lano- kaj silko-ŝtofoj reduktiĝis meznombro de procentojn ekde la 8-a de oktobro laŭ la anonco de la Komerc-administracia Buroo de Nordorienta Ĉinio.

Dank' al la prezredukto, la kamparanoj povas aĉeti nun unu procenton pli multe da tiaj industriaj produktaĵoj por siaj nunaj vendprezoj de krudmaterialoj.

Pli multe da ŝtofo estas liverita al la merkato fare de la Nordorientaj komercaj kompanioj kaj kooperativaj por plenumi la kreskantan bezonon.

Pli da Teksajoj Produktiĝis

Ĉirkaŭ 70 milion metrojn pli da ŝtofo estis fabrikita de la ŝtataj kaj ŝtata-privataj teks-fabrikaĵoj de Ĉinio en la tria jarkvarono de 1953, kompare kun la sama periodo de la lasta jaro. Kvalito de la ŝtofo teksita estis super normo.

La pliiĝo de produkto ĉefe ebligis la instaligo de temperatur-ĝustigiloj en la teks-fabrikaĵoj. Antaŭe produktado de teksaĵoj falis ĉiujare en la varmega somera vetero.

Kurantaj Aferoj

aĉetis kelkajn ekipaĵojn por akuŝado, kaj starigis infanvartejon por infanoj unu-ĝis-ses-jaraj por ke iliaj patrinoj ne sin ĝenu."

Dank' al la partopreno de virinoj, la kooperativo havis tre abundan rikolton lastjare. Pli-grandigita laborpovo ebligis ĝin fari multe da forstokulturado kaj dragado de akvokonservejoj. En la lasta jaro la nombro de labortagoj de 24 virinaj anoj estis 35 procentoj de la tuta nombro de labortagoj de la kooperativo. En la tri fojoj dum la jaro kiam labormodeloj estis elektitaj, 40 procentoj de tiuj elektitaj estis virinoj.

Pozicio de Virinoj Ŝanĝiĝis

"Post tio ĉio ŝanĝiĝis por ni virinoj," diris Ŝen Ĝji-lan ĝoje. "Anstataŭ tri oficistinoj en la kooperativo, nun troviĝas ok. Ĉiu nin estimas, ĉu en la vilaĝo, aŭ en la hejmo. Ĝang Ŝjue-hŭa estis antaŭe ofte ĉagrenita de sia edzo; hodiaŭ li estas tiel fiera pri sia edzino ke li traktas ĝin kiel trezoron. Mia propra bopatrino ofte diras, 'Antaŭe ni ĉiuj ok en la familio dependis de la maljunulo por vivtenado—nun la helpo de Ĝji-lan estas al ni ne mankebla.' Antaŭ ne longe, nenion antaŭdirinte, ŝi faris por mi flordeseĝnan litkovrilon kaj kelkajn novajn vestojn. Kaj plie, neniua familia decido estas farita sen konsultiĝo kun mi. Nur imagi, antaŭ kelkaj jaroj mi eĉ ne kuraĝis sidiĝi kaj kunmanĝi kun la viroj. Kaj la nia ne estas la nura familio en kiu tiaj aferoj okazas."

"Ĉu vi faris ion por disvastigi ĉi tiun sperton ekster via propra kooperativo?" mi demandis.

"Ho, jes," ŝi diris, "mi ofte eliras por doni paroladojn al aliaj kamparanoj."

"Kiel vi parolas al ili?" mi demandis.

"Mi diras al ili la faktojn," ŝi respondis.

Ĝi estis la unua fojo ke Ŝen Ĝji-lan vizitis Pekinon. Kiam mi demandis ŝin kiel ŝi sentis, ŝi parolis kun ĝojo kaj sincereco. "Kiel mi povus veni ĉi tien se ne pro Prezidanto Maŭ kaj la Komunista Partio? Ĉu vi scias ke hieraŭ, ĉe la bonveniga kunsido, mi efektive man-premis kun li? En la malnovaj tagoj, dum mia tuta vivo mi eĉ ne povus vidi nian guberniurbon, jam ne parolu pri Pekino!"

Antaŭ la finiĝo de la Kongreso, al Ŝen Ĝji-lan estis donita nova honoro. Ŝi estis elektita unu el la delegitoj al la Tutmonda Kongreso de Virinoj en Kopenhago.

Mi deziris vidi ŝin kiam ŝi trapasis Pekinon sur sia revena vojo. Sed kiam mi vizitis ŝin, ŝi jam foriris al sia hejmvilaĝo. Tial mi devas fini ĉi tiun pecon per la vortoj kiujn ŝi diktis al iu raportisto por la monata ĵurnalo *Virinoj de Nova Ĉinio*.

"Pasante tra Sovetunio, mi vidis tiom da virinoj, kiom da viroj, laborantaj en la kampoj. Ĉe la fervojo mi vidis fervojajn laboristinojn plenumantajn ĉiajn



Ŝen Ĝji-lan klarigas al la virina grupo pri la manipulado de novtipa plugilo.

laborojn. Sovetiaj virinoj povas fari ĉion kion viroj povas, kaj faras bone. Ili estas feliĉaj kaj prosperaj. Ni ĉinaj virinoj devas lerni multe de niaj najbaraj fratinoj.

"Kio impresis min plej forte estis la parolado de S-ino Eugenie Cotton el Francio, prezidanto de la Internacia Demokrata Federacio de Virinoj. Ŝiaj vortoj, ke ni ĉiuj devas fidi unu al la alia, daŭre sonoras en miaj oreloj. Vere, se ĉiuj pacamantaj virinoj de la mondo helpas unu la alian kaj unuiĝas intime, ni povos protekti niajn proprajn rajtojn kaj feliĉon kaj tiujn de niaj infanoj, kaj ankaŭ gajni longdaŭran pacon.

"Nun mi denove estas hejme. Mi diros al ĉiu kion mi vidis. Kaj mi volas labori pli energie ol antaŭe en mia agrikultura produkta kooperativo por kolekti pli grandajn rikoltojn por subteni la industriigon de nia lando."

EL POPOLA ĈINIO

Monata Informa Bulteno Eldonata de Fremdlingva Eldonejo

Redakcio: 26 Kuo Hui Chieh, Peking, Ĉinio
Administracio: 38 Suchow Hutung, Peking, Ĉinio

KVARA JARO N-RO 11

E N H A V O

La Universala Elektado de Ĉinio
Por la Venko de Mondpaco kaj Prospero de Popola Kulturo
Nova Ĉinio Kantas
Sukcesoj de la Ĉina Popolo en Irigacio
La Ŝoseo-konstruado de Nova Ĉinio
Kion Mi Vidis en Fuŝun
Mej Lan-fang—Granda Klasika Aktoro de Ĉinio
Ŝen Ĝji-lan—Virino de Nova Ĉinio

